


**ROK XXV.**  
**SIERPIEŃ - WRZESIEŃ**  
**N-r 8-9.**



**JARO XXV.**  
**AŬGUSTO - SEPTEMBRO**  
**N-o 8-9.**

**DE KONGRESAJ TAGOJ...**



Solena malfermo de la kongreso en „Ora Cambrego“ de Katolika Domo. — Inaŭgura parolo de s-o B. Long, prezidinto de l' Oksforda kongreso.

**ESPERANTYSTA POLSKI**  
**POLA ESPERANTISTO**

**WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW**

**ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34**

**REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ  
TADEUSZ HODAKOWSKI**

**REDAKTOR ODPOWIEDZIALNY: JULJUSZ KRISS.**

**PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.**

**ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—**

**Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.**

**Eksterlande jarabono — 1 dolaro.**

**Podwójny numer Zł. 1.40 Duobla numero.**

**OGŁOSZENIA:**

1 strona . . . . .	Zł. 60—
1/2 strony . . . . .	„ 32—
1/4 strony . . . . .	„ 17—
1/8 strony . . . . .	„ 10—

**ANONCOJ:**

1 paĝo . . . . .	Zł. 60—
1/2 paĝo . . . . .	„ 32—
1/4 paĝo . . . . .	„ 17—
1/8 paĝo . . . . .	„ 10—

**PRZEDSTAWICIELE — REPREZENTANTOJ.**

**Katowice: Soc. de Esper. Amikoj, Wawelska 3.**

**Paryż: S. Grenkamp, Paris 6. 4 rue de Vaugirard.**

**Warszawa: Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.**

Przyjmują zamówienia abonament. i ogłoszenia do „Polskiego Esper.” i „Pomocniczego Języka Świat.”

Akceptas abonojn kaj anoncojn por „Pola Esperantisto” kaj „Pomocniczy Język Światowy”.

**WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!**

**Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado”.**

**Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—**

**Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.**

**DO P. T. CZYTELNIKÓW!**

Upraszamy uprzejmie P. T. Czytelników o załączanie znaczka pocztowego na odpowiedź, przy wszelkiej korespondencji, zarówno redakcyjnej jak i administracyjnej.



# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO  
KAJ EKSTERLANDE.

## ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE  
I ZAGRANICĄ.

ROK XXV JARO

K R A K Ó W

SIERPIEŃ -  
WRZESIEŃ

1931

AUGUSTO-  
SEPTEMBRO

Nr 8-9 N-o

### NIA DUDEK TRIA EN KRAKOVO.

**K**rakovo, la urbo de historio!

De historioj pola kaj Esperanta.

La iama ĉefurbo de Polujo, rememoriganta preskaŭ ĉiu-paŝe pri tempo pasinta. Pri feliĉaj kaj malfeliĉaj tagoj de pola popolo. Pri ĝia disvolviĝo en libereco, pri ĝiaj bataladoj por reakiri la perditan sendependecon, pri ĝiaj suferoj kaj malsukcesoj.

La urbo, kiu kvankam nun ne plu laŭnome ĉefurbo, restas ankoraŭ hodiaŭ spirita centro de renaskiĝinta Polujo. Urbo kvieta, nepretendema, kiu igas ĉiun polan koron pli vigle ekbati, urbo tiel kara por ĉiu civitano de Pola Respubliko.

Krakovo, la urbo de Esperanta historio!

La urbo, kie okazis la Oka Kongreso.

La Oka Kongreso, festanta la maturiĝon de Esperanto, la dudek-kvinjaran ekzistadon de nia kara lingvo.

La urbo, kiu bone ankoraŭ rememoras la entuziasmigitan diverslandan Esperantistaron, amase venintan tiam al ĝi kune kun sia amata Majstro por manifesti, ke Esperanto ne plu estas ludilo kaj posulas sian rajton por vivo.

La urbo, kie la ĉiam modesta Dro Zamenhof faris sian lastan kongresan paroladon, sian kanton de cigno, kaj demetinte propravole de si la rolon kaj titolon de Majstro montris per tio ekzemplon al ĉiuj Esperantistoj, ke ili pli ŝatu la altan ideon de nia movado, ol la gloriĝon de sia propra persono, ke eĉ la plej meritplenaj el ili sciu la neceson de disciplina obeo al la postuloj de la tuta Esperanto-movado, ke fine ĉiuj Esperantistoj bone komprenu la signifon de tiu fakto, ke la aŭtoro de Esperanto kaj de ĝia ideo eksidis inter la multnombraj gesamideanoj, kiel simpla ano de tiu granda movado.

Kiel la poloj memoras pri Krakovo, la urbo de sia historio, tiel ankaŭ la Esperantistoj bone memoru pri Krakovo, kie la Majstro donis al ni neforgesindan instruon!

#### AL KRAKOVO!

Kun pezaj koroj la verdstelanoj en ĉiuj landoj atendis la nunjaran Universalan Kongreson en Krakovo.

Terura ekonomia krizo ekskuis la tutan mondon. La Esperantistoj plejparte malriĉaj homoj, ŝparantaj kutime dum la tuta jaro por povi feliĉe travivi unu semajnon en la agrabla amika rondo tut-

monda, nunjare ekstaris antaŭ preskaŭ neefektivigebla tasko. Tial la listo de kongresanoj estis ĝis la lastaj semajnoj antaŭkongresaj tre, eĉ tro modesta.

Kaj tamen la mirinda forto de la Esperanto-movado instigis multajn gesamideanojn venki ĉiuspecajn barojn kaj veni al la mondfesto de Esperantujo en Zamenhofa naskolando. El la 777 aliĝintoj impona nombro da 700 tamen fakte alvenis al Krakovo. Speciale ni devis admiri la sindonemon de niaj germanaj amikoj, kiuj estis lastmomente plej multe trafitaj de la ekonomia krizo kaj precipe suferis pro la altega pasport-kotizo (100 germanaj markoj!). Malgraŭ tiuj batoj de l' sorto germana samideanaro tamen ne restis sen reprezentantaro dum la Kongreso, pro kio oni devas ilin speciale gratuli kaj danki.

Veturante al la Kongreso mi havis la bonŝancon renkonti en Varsovio la karavanon de studentoj, gvidatan de s-roj Dratwer kaj Berman. La juna gesamideanaro, okupinta tutan vagonon, speciale rezervitan, kreis tuj gajan, bonan atmosferon antaŭkongresan.

Tiu simpatia atmosfero tiel influis ĉiujn, ke eĉ la grizbarbeta delegito de UEA en Łomża s-ro Perelman, senlace dum la tuta jaro gvidanta (malgraŭ la malkontento de lia edzino) multnombrajn kursojn de Esperanto en sia urbo, kun juneca energio saltsidiĝis sur tableton kaj, ĉirkaŭita de fraŭlinoj, deklamis sian salutversajon por la Kongreso.

Rapide pasis la longa nokto en samideana rondo.

Jen estas jam Krakovo. Aro da krakovaj gesamideanoj atendas jam, malgraŭ la frua matenhoru, la alvenintojn. Loĝeja servo sub gvido de senlaca s-ino Neuberg funkcias ne en la Kongresa Akceptejo, kiel tio okazis en aliaj kongresurboj, sed tie-ĉi en la stacidomo mem, en ĉambro, ornamita je honoro de Esperantistoj per naciaj flagoj de ĉiuj regnoj.

Multaj gesamideanoj diverslandaj plenigas tiun-ĉi ĉambron, kie servemaj krakovanoj rapide prizorgas al ĉiuj la plej necesan kaj plej gravan aferon: la loĝejon.

Malnovaj konatoj, la konstantaj „vizitistoj“ de la Esperanto-Kongresoj, ĝoje salutas kaj manpremas reciproke, kongresaj novuloj avide interkonatiĝas kun eksterlandaj samideanoj (kaj samideaninoj).

La Kongreso fakte komenciĝis.

### EN LA AKCEPTEJO.

Forveturiginte siajn pakajojn al la ricevitaj loĝejoj, la ĝekongresanoj post malgranda ripozo (tempo mankas!) kaj granda lavado (pro la longa veturo) rapidas de ĉiuj flankoj de urbo al la Akceptejo, troviĝanta en la domo de la Komerca Akademio.

Tuj mi ekkonas tiun domon de malproksime laŭ la bildoj de Oka Kongreso, aperintaj siatempe en la jaro 1912 en „Pola Esperantisto“. Bedaŭrinde, nunfoje mankis tie la granda elpendaĵo, kiu ja klarigis al la gesamideanoj kaj al ne-Esperantistoj, ke tie-ĉi estas la Akceptejo de XXIII-a Universala Kongreso Esperantista.

Sed Esperanto multe progresis deŝt de la tempo de la Oka. Nun eble sufiĉas granda flago Esperanta kaj farita el verdaĵo stelo. La publiko nun jam scias, kio estas Esperanto...



Kaj tamen ŝajnas al mi, ke manko de la ŝildo estis erareto de la Organiza Komitato, cetere pardoninda pro ĝia grandega laborado diversflanka.

La bonajn rezultojn de tiu laboro oni vidas ĉiupaŝe: jen policanoj, parolantaj Esperanton, jen tramistoj, ankaŭ esperantigitaj, jen multaj afiŝetoj „Esperanto parolata“ en la magazenoj kaj — kia ĝojo! — en restoracioj — preskaŭ la tuta Krakovo estas esperantigita. Tio estas la merito unuavice de la kursa sekciestro dro Dreher kaj de la propaganda sekciestro prof. Biliński.

Sed ni ne haltu tro longe antaŭ la pordo de la Akceptejo, des pli ke multaj grupetoj de diverslandaj gesamideanoj vere malhelpas la movadon sur la trotuaro por la trankvilaj loĝantoj de Krakovo, kiuj cetere ĉiel montras sian afablecon kaj simpatian por la gastantoj en ilia urbo filoj de la tuta homaro.

Jam malsupre en la teretaĝo ni havas laboron: multaj kongresciigoj — ĉiuj „tre urgaj“ kaj „tre gravaj“ — atendas, ke ni legu ilin.

Sed jen estas io tre interesa: sur la muroj pendas grandaj blankaj kartonegoj plej diversaj turismaj gvidiloj, eldonitaj sub aŭspicioj de la Turisma Servo de UEA. Ĉies atenton altiras speciale luksa „Verda Gvidlibro“ tra Milano kaj Lagoj.

Sur aparta kartonego ni trovas diverslingvajn ŝlosilojn, eldonitajn sub aŭspicio de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

Tiun malgrandan, sed tre efikplenan ekspozicion, aranĝis la Direktoro de UEA s-ro Hans Jakób kun helpo de loka agema Delegito de UEA s-ro Ign. Wiesenberger.

Sur la unua etaĝo vigla kongresa vivo jam bolas. Unu ĉambro prezentas la faktan „Akceptejon“. Tie ĉe longa tablo sidas afablaj samideaninoj, kiuj kontraŭ monro de la provizora kongreskarto enmanigas al la alvenantaj kongresanoj dikan kovertegon kun kongreskarto, plaĉa kongresinsigno, luksa gvidilo tra Krakovo, kies eldonon oni ŝuldas al monsubvencio de magistrato, gvidilo tra Pollando, diversaj biletoj por kongresaranĝoj, komercaj reklamiloj ktp. Ĉe alia tablo kasisto de la Kongresa Komitato s-ro Józef Alfus kun serioza mieno tre rapide enspezigas monon, ŝanĝas eksterlandajn valutojn kaj plej zorge ĉion notas. Juna sinjoro vendas biletojn por ekskursoj, aranĝataj de la vojaĝoficejo „Orbis“, ridetante preskaŭ ĉarme dum tiu vendado al la kongresanoj (laŭofice) kaj al la kongresaninoj (pro propra plezuro).

En alia ĉambro estas la Kongresa Vendejo. Sur bretaroj kaj longaj tabloj vi trovas tie la plej belajn Esperantajn verkojn, laste aperintajn ĉe Hirt, Literatura Mondo kaj aliaj eldonejoj. Oni facile konstatas la ĝojige rapidan lastatempe kreskon de nia literaturo. Ankaŭ aliaj speciale kongresaj Esperantaj ktp. Bona ideo estis aperigi kovertojn, kunligitajn kun leterfolio kaj surhavantaj kelkajn belajn bildojn de la kongresurbo. Ankaŭ mutkoloraj krakovaj tipaj popolaj ellaborajoj altiras atenton kaj ĝuas intereson de la multnombra gesamideanaro.

Sur la sama etaĝo troviĝas kongresa poŝtoŝtanco, kie la geoficiistoj, flue parolantaj Esperanton priservas la publikon. Ĉiuj poŝtajoj ricevas specialan kongresstampon: „23-a Internacia Kongreso Espe-

rantista Krakovo". Bedaŭrinde, la teksto estas nur pollingva, dum ĉe antaŭaj kongresoj la teksto estis dulingva.

Sur supra etaĝo troviĝas sekretario, kie laboregas la organiza sekretario s-ro Stanisław Rudnicki, helpata de siaj du filinoj. Ankaŭ la ĝenerala sekretario de la Kongreso prof. Hođakowski estas tie-ĉi iafaje trovebla, se li ne kuras tien kaj reen pro kongresaferoj. Ofta gasto en la sekretario estas ankaŭ la direktoro de I. C. K. s-ro Robert Kreuz, ĉiam laborŝarĝita. Ankaŭ aliaj Esperantaj eminentuloj, aranĝantoj de fakkunvenoj, ĵurnalistoj, venas tien-ĉi, petas informojn, donas konsilojn, plendetas pri iaj detaloj, zumas kaj malhelpas al s-ro Rudnicki, kiu tamen neniel perdas la paciencon kaj aŭfable priservas ĉiun.

Aliaj ĉambroj estas destinitaj por fakkunvenoj, babilado, skribado de leteroj.

La aminda prezidanto de la Kongresa Komitato, la koro kaj spirito de pollanda Esperanto-movado, prof. dro Bujvid montras ekzemplon de laborado. Jen li estas en la kongresa akceptejo, prizorgante necesajn aferojn, jen li atentigas sian kunlaborantojn pri aferoj, nepre ankoraŭ farotaj, jen li jam malaperas por prizorgi ion aliloke, ĉe aŭtoritatuloj, li denove en la Akceptejo konferencas kun iu, jen li pacience aŭskultas la „tre gravan“ projektegon, kiun submetas al li ia nova, tre arda, sed tre nepraktika Esperantisto, jen... Sed prof. Bujvid denove malaperis ien kaj mi ne povas tiom fulmrapide noti ĉiun lian paŝon.

### SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO.

Vespere la gekongresanoj, aŭtoritatuloj, ĵurnalistoj kaj publiko plenigis la ampleksan salonon de Katolika Domo.

Je 7-a horo eksonas preludo de la orkestro, kiun sekvas la pola nacia himno.

La prezidinto de XXII-a Universala Kongreso en Oksfordo s-ro Bernhard Long laŭ tradicia kutimo malfermas la Kongreson kaj post vortoj de saluto proponas la elekton de Kongresa estraro.

Per aklamado estis elektitaj: honora prezidanto prof. dro Edmund Załęski, rektoro de la Universitato, prezidanto prof. Odo Bujvid, vicprezidantoj inĝ. Eugenjusz Tor, f-ino Rena Weinsberg (Krakovo), R. Robertson (Londono), prof. dro Kamaryt (Bratislava), Einar Dahl (Falun), dro Kurt-Heinz Friedmann (Dresden), prof. dro Christanell (Vieno), Enthoven, Fox (Danzigo), Johannes Karsch (Dresdeno), Franz Schoofs (Antverpeno), konsilanto Sász (Budapest), Talivaldo Indra (Riga), Radev (Ruse), prof. dro Kawahara (Tokio), konstanta ĝenerala sekretario Robert Kreuz (Genevo), ĝeneralaj sekretarioj Hođakowski kaj Rudnicki, sekretarioj Alfus, Biliński, dro Dreher, vicsekretarioj dr-ino Rosenthal, dro Ziomek, asistanto Dąbrowski.

Multe aplaŭdata transprenas prof. Bujvid la prezidon kaj varme salutas la ĉeestantajn aŭtoritatulojn kaj la verdstelanojn, venintajn el plej diversaj anguloj de la mondo.

Poste faras la kongresan paroladon la prezidanto de ICK. s-ro John Merchant. Li alportis specialan saluton al la honorinda kongresprezidanto prof. dro Bujvid, la fidela kolego kaj amiko de nia kara Majstro. Li dediĉis varmajn vortojn ankaŭ al la bela lando Polujo, kie la Majstro naskiĝis, vivis kaj nun ripozas, dum lia spirito



restas inter ni, Esperantistoj. Li mencias la mortintan pioniron de nia movado la meritplenan prezidanton de Lingva Komitato prof. Th. Cart kaj alian fidelan Esperantiston dron Sós el Vieno. Ilia memoro estas honorigata per leviĝo.

Varmajn vortojn de saluto kaj de simpatio al la Esperanta movado eldiras la reprezentanto de la registaro vicvojevodo dro M. Bilek, la rektoro de universitato prof dro Zaŝeski kaj la vicurbestro dro Klimecki.

Poste salutas la diplomaciaj reprezentantoj de Aŭstrujo (vickonsulo Wojnovich), Germanujo (konsulo Hodiger), Lihtenstejno (Rob. Kreuz), Holando (ing. Isbrücker), Norvegujo (s-ro Eriksson) kaj la reprezentanto de la urbestraro de Biaŝtostok (J. Šapiro).

En la nomo de la Internacia Laboroficejo ĉe la Ligo de Nacioj salutas s-ro Hediger, en la nomo de cionistoj dro Dreher. Sekvas salutparoladoj de reprezentantoj de aliaj organizaĵoj.

La prezidanto prof. Bujvid direktas specialan saluton al la ĉeestantaj familianoj de la Majstro, post kio Dro Leono Zamenhof alparolas la Kongreson, tuŝante ĝeneralajn temojn de la Esperantomovado.

Poste parolas la naciaj reprezentantoj: Aŭstrujo (Hugo Steiner), Belgujo (Fr. Schoofs), Britujo (R. Robertson), Bulgarujo (Radev), Ĉeĥoslovakujo (Pitlik -ĉeĥoj, Hub -germanoj), Danzigo (f-ino Spiess), Estonujo (Brauer), Francujo (Borel), Germanujo (A. Münz), Hispanujo (pastro Font Giralt), Hungarujo (f-ino Kleinberger), Italujo (prof. dro Canuto), Japanujo (prof. Kawahara), Latvujo (T. Indra), Nederlando (s-ro Isbrücker), Rumanujo (Morariu), Svedujo (Dahl), Svislando (Hans Jakob), Sudslavujo (Ivo Lapenna), Usono (R. Scherer). En la nomo de Universala Esperanto-Asocio salutis ĝia reprezentanto s-ro Joh. Karsch.

La solenajo finiĝas per la „Espero“.

### INTERKONATIĜA VESPERO.

De la kongresejo oni iris al Malnova Teatro, kie okazis la tradicia Interkonatiĝa Vesperejo.

Gajeco kaj samideana libereco regis tie.

Sed mi restu diskreta kaj ne plu rakontu, ĉar interkonatiĝoj kun ĝiaj sekvoj ne apartenas al oficialaĵoj kaj ne estas priraportotaj.

### ZAMENHOFSTRATO EN KRAKOVO.

La sekvantan tagon, dimanĉe la 2. VIII., matene okazis protestanta diservo en la preĝejo de Sankta Martino kun prediko de pastro Hoppe kaj katolika diservo en la preĝejo de Sankta Mario, celebrata de pastro Andreo Ĉe kun prediko de pastro Dro Kukuŝka el Bydgoszcz. Dum la katolika meso religiajn solkantojn bele plenumis s-ino Solvi-Sękarówna kaj s-ro J. Sowiński. Ludis orgenon s-ro B. Walek-Walewski.

Poste la kongresanoj kolektiĝis apud la monumento de Mickiewicz, de kie oni ekmarŝis kun la verdaj standardoj al la strato Niecała, kiu de nun laŭ decido de krakova urbestraro portos la nomon „strato de dro Ludoviko Zamenhof“.

La tuta amaso haltas ĉe la komenco de la strato. Tie jam kolektiĝis arkaŭ reprezentantoj de la registaro, urbestraro, milita estraro kaj multaj krakovanoj.

Vicurbestro de Krakovo dro Klimecki suriras tribunon kaj parolas en la nomo de la urbo. Li akcentas, ke Zamenhofs strato en la antikva pola urbo Krakovo estos poreterne signo de la granda estimo, kiun ni ĉiuj ŝuldas al la genia kreinto de internacia lingvo Esperanto, servanta al nobla ideo de kunfratigo de popoloj.

Fininte la paroladon, la vicurbestro malkovris la novan stratŝildon kun surskribo en pola lingvo „Ulica Dra Ludwika Zamenhofs“ kaj la memortabulon pri la decido de krakova urbestraro.

Prof. dro Bujvid tradukis esperanten la paroladon kaj esprimis dankon al la reprezentantoj de la urbestraro, precipe al eksurbestro inĝ. Rolle, kiu faris la koncernen proponon dum la kunsido de urba konsilantaro.

Per komuna kantado de la Esperanto-himno finiĝas tiu bela solenaĵo.

Poste oni procesie marŝis tra la urbo al la historia reĝa kastelo Wawel, kie okazis komuna fotografado de la kongresanaro.

### **EKSKURSO KAJ ORATORA KONKURSO.**

Posttagmeze okazis ekskurso al arbaro Wola (Lasek Wolski), kiu tre bone sukcesis dank' al bela vetero.

Veninte al la celo de la ekskurso la gekongresanoj ripozis kaj gaje interbabiladis. S-ro Werner el Danzigo aranĝis eksterprograme diversajn amuzigajn ludojn kaj dancojn, kiujn partoprenis tre volonte kaj eĉ fervore multaj gesamideanoj, eĉ grizbarbaj.

Poste okazis tie ankaŭ la anoncita Oratora Konkursio. Ĝin partoprenis neatendite multaj kandidatoj je diplomitaj oratoroj.

Paroladis je temoj, starigitaj de la konkursa komitato, s-roj Morariu, Dahl, Neuzil, Dratwer, Scherer, Jarecki, f-ino Nadel kaj pastro Font Giralt.

Ĉiuj parolintoj rikoltis merititajn aplaŭdojn. Specialan sukceson havis pastro Font Giralt, posedanta tondran voĉ(eglon).

La konkursa juĝantaro sub prezido de s-ro Warden severe esploris ĉies kvalitojn kaj post detala preparolo fiksas sian verdikton. Unua premio estis aljuĝita al pastro Font Giralt (88 punktoj), dua al s-ro Tiberio Morariu (86) punktoj), tria al s-ro Jan Jarecki el Varsovio (80 punktoj).

### **„GAJA VESPERO“.**

Vespere laŭprograme okazis en Malnova Teatro „Gaja vespero“. Bedaŭrinde la Kongresa Komitato ne atentigis la kongresanaron, ke ĝi ne estas kongresa aranĝo kaj ke la programo okazos preskaŭ nur pole.

La kongresanoj, ne estante avertitaj pri tio, aĉetis biletojn kaj poste ne havis plezuron, aŭskulante gajigajojn en... nekomprenebla al ili pola lingvo.

La malgranda Esperanta parto ne povis savi la situacion.

Tamen granda parto de la kongresanaro ne partoprenis ĝenerale tiun laŭprograme „gajan vesperon“ kaj eksterprograme tre gaje pasigis la vesperon en krakovaj restoracioj „Pavilono“ k. a., kie krom Esperantlingvaj menuoj estis ankaŭ bona okazo por danci.



## TRIA KONGRESTAGO.

Lunde matene en la salono de la Katolika Domo okazis la unua laborkunsido de la Kongreso.

Bedaŭrinde, mi iom malfruis la komencon de tiu kunsido kaj tial ne povas raporti pri kelkaj salut- kaj aliaj paroladoj, okazintaj antaŭ la pritrakto de la raporto de ICK.

La prezidanto s-ro Merchant faras klarigojn pri la raporto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado pri la agado dum la jaro 1930/1. Li mencias, ke la Esperanto-movado montras sufiĉe bonan progreson kaj ĝi estas hodiaŭ tiel forta, ke eĉ la ekonomiaj cirkonstancoj ne povas mortigi ĝin.

Mi devas ĉi-loke rimarkigi, ke la interesa raporto, presita kiel kutime en la Oficiala Raportaro, nunjare ne estis bone konata al plimulto de la kongresanoj, ĉar tiu Raportaro estis dissendita de la ICK iom tro malfrue, tiel ke ĝi ne atingis parton de la kongresanaro. Cetere, kulpis tie — laŭ ricevita klarigo — la cirkonstanco, ke ICK pro ŝparemo ne deziris pli da ekzempleroj, ol necese, kaj tial estis devigata atendi preskaŭ ĝis la lasta momento, des pli ke la Esperantistoj havas iom nebonan kutimon aliĝi al la Kongreso nur lastmomente, malfaciligante tiel la laboron al la Organiza Komitato.

La Direktoro de ICK s-ro Kreuz aldone mencias pli detale pri kelkaj agadkampoj: propaganda mondvojaĝo de s-ro Scherer, radio, gazetaro, internaciaj organizaĵoj ktp.

Prof. dro Bujvid montras, kiom malfacila estas la laboro por enkonduki Esperanton en diversajn mediojn. Li rakontas pri multaj klopodoj, faritaj ĉe pola radio, kun malgranda nur rezulto kaj pri sammulta klopodado — ĝis nun sensukcesa — pri eldono de pola Esperanto-poŝtmarko.

La prezidanto de Koro (Konstanta Rezentantaro de Naciaj Societoj), s-ro Schoofs legas la raporton pri financoj, intence plilaŭtigante sian voĉon dum legado de nomoj de tiuj naciaj Esperanto-societoj, kiuj forgesis pagi al Koro la kotizon por sia lando.

Tiu speciala akcentaĉo havas tujan efikon. Kelkaj reprezentantoj senkulpigas sin kaj iuj el ili eĉ deklaras la pretecon tuj pagi la ŝuldatan kotizon.

Laŭ propono de s-ro Merchant oni aklame decidas sendi telegramon al la Prezidanto de Pola Respubliko.

Sinjoro J. Karsch, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio petas, ke oni multnombre vizitu la morgaŭan kunsidon de UEA.

Post mallonga parolado de s-ro Steiner pri la nuna stato de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno nia konata Esperanto-verkisto Jean Forge-Fethke raportas pri propagando de Esperanto per filmo. Li atentigas pri nepra neceso enkonduki Esperanton en la filmaktualaĵojn. La raportanto, kiu estas mem filmfakulo, donas tre valorajn indikojn pri tiu afero.

La raporto vekas viglan diskuton, kio montras, ke la tuŝita temo estas tre aktuala.

Posttagmeze okazis ankaŭ da fakaj kunvenoj (katolikoj, blinduloj, Internacia Ligo de Esp. Poŝt- kaj Telegraficistoj, Unuiĝo de Esp. Virinoj, abstinenculoj).

Kunsidis ankaŭ la komitato kun la ĉefdelegitoj de UEA, pri-

traktante gravajn aferojn de la Asocio, kaj la Ĝenerala Estraro de la Esperanto-Movado.

Vespere en Malnova Teatro okazis Internacia Koncerto. Pro subita ekmalsaniĝo de la fame konata kantistino Ada Sari, ravinta per sia voĉo siatempe la Okanojn, ŝin anstataŭis s-ino W. Walewska, kantistino de Lvova opero, kiu per sia belsona voĉo prezentis kelkajn polajn kaj alilingvajn kantojn. Artisto de „La Scala“ en Milano s-ro Z. Zalewski ravis per baritono en italaj kaj francaj kantoj. La ĥoro de krakova kantsocieto „Eĥo“ sub gvido de komponisto s-ro Wallek-Walewski plenumis diverslingvajn kaj Esperantajn kantojn. La finon kronis la „Espero“, kantita de tiu ĥoro.

### SOMERA UNIVERSITATO.

La anoncita por tiu tago mallerma prelego de prof. dro Wilkosz el Krakovo pri signifo de turismo por la mensa evoluo bedaŭrinde ne povis okazi pro foresto de la preleganto. Ĝenerale oni devas konstati, ke nunjare la Somera Univeritato ne tro sukcesis pro foresto de aro da prelegantoj.

Tio estas des pli bedaŭrinda, ke la ĝenerala temo, elektita nunjare por Somera Universitato, estis la turismo, t. e. medio, kie Esperanto havas nun eble plej bonajn ŝancojn rapide enpenetri kaj montri sian grandan utilon. La belaj rezultoj, atingitaj jam multloke de Turisma Servo de UEA, estu instigilo por niaj propagandistoj al plua laboro tiudirekte. Ne ĉiuj tamen konscias la gravecon de turisma propagando por ĝeneralaj kaj precipe ekonomiaj interesoj de la koncernaj lokoj kaj landoj. Aro da lekcioj en Somera Universitato pri tiu temo estus tial utila por nia movado.

Ĝenerale ŝajnas al mi, ke sola bone sukcesinta Somera Universitato estis la unua, organizita en Ĝenevo dum la XVII-a Universala Kongreso. Ĝi montris sistemecon, bone pripensitan planon kaj estis vere sur alta nivelo, ne perdante samtempe — pro interesa prelegaro — la allogforton.

ICK nepre devos por estonteco dediĉi pli da atento al la afero de Somera Universitato por ke la bela komenco de Ĝenevo en la jaro 1925 ne finiĝu per kompromito de nia afero en sciencaj rondoj. Somera Universitato devas esti serioze organizita kaj montri necese altan nivelon. Ni esperu, ke sekvontan jaron en Parizo ĉe Sorbono ni ne havos okazon por plendi.

### KVARA KONGRESTAGO.

Marde, la 4-an de Aŭgusto, matene okazis tre bone vizitita ĝenerala kunveno de UEA. Prezidis la vicprezidanto de la Asocio s-ro Johannes Karsch el Dresdeno.

La direktoro de UEA s-ro Hans Jakob donis detalajn klarigojn pri la agado kaj financa raportoj de la Asocio, presitaj en la Kongresa Raportaro, kaj skizis planon por estonta laboro.

Dum la diskutado la ĉeestantaj membroj kaj Delegitoj rakontis interesajn ekzemplojn el propra praktiko pri efikaj servoj de UEA.

Estis esprimita deziro, ke UEA penu organizi por siaj membroj nekarajn studvojaĝojn.

La raportoj de la Direktoro estis aprobitaj.

Krom tio kunsidis aparte I. C. K. kun K. R., pritraktante ĝeneralajn demandojn de nia movado.



Prof. dro Bujvid invitis ĉ. 100 diversnaciajn reprezentantojn de la Esperantistaro al tagmanĝo en la restoracio Poller. En amika interparolado la verda „rondo familia“ bonege pasigis la tempon. En siaj tostoj dum la tagmanĝo ĉiuj parolintoj substrekis la grandajn meritojn de prof. dro Bujvid por la Esperantista movado. Prave iu rimarkigis, ke prof. Bujvid, kiu laŭprofesie okupiĝas ĉiam pri bakterioj, infektiĝis per bakterio de Esperantismo kaj depost tiam senlace inokulas tiun bakterion al la tuta mondo.

Post la tagmanĝo parto de la kongresanaro veturis ŝipe al Bielany kaj Tynieć. Tiu ekskurso, aranĝita de vojaĝoficejo „Orbis“, estis iom nezorge organizita kaj tial kaŭzis plendojn.

El samideanoj, restintaj en la urbo, parto kunvenis ĉe teo, invititaj de I. C. K., alia parto fervore vizitis diversajn fakkunvenojn.

Vespere en Malnova Teatro okazis dua parto de la Internacia Koncerto, kiu havis same merititan sukceson, kiel la unua.

### KVINA KONGRESTAGO.

Merkrede matene okazis dua laborkunsido de la Kongreso. Ĝin komencis raporto pri „gazetara propagando, ĝia utilo kaj organizo“, farita de s-ro J. Šapiro, membro de Internacia Gazetara Komisiono, kiu anstataŭis la prezidanton de la Komisiono s-ron Georges Avril, malebligitan veni al la Kongreso.

S-ro Teo Jung, ĉefredaktoro de „Heroldo de Esperanto“, raportis pri „centrigo de la gazetara informado pri Esperanto“.

Ambaŭ raportoj elvokis viglan diskuton.

Vicprezidanto de UEA s-ro Johannes Karsch faris interesan paroladon pri „vojoj kaj metodoj de apliko de Esperanto por turisma reklamo“.

Kortuŝa por ĉiuj estis poste la momento, kiam dum streĉita atento kaj plena silento, estis disaŭdigata per gramofona disko la voĉo de nia Majstro. Kiel estas konate, la posedanto de koncerna fonografa cilindro s-ro Sabadell en Barcelono post multa klopodado de I. C. K. kaj de hispanaj esperantistoj fine cedis kaj permesis reprodukti la voĉon de nia Majstro. Bedaŭrinde, pro neperfekteco de la vaksa fonografa cilindro, la gramofona reprodukto nur parte sukcesis. Ĉiaokaze, la demonstrado de la disko faris je ĉiuj profundan, neforgeseblan impreson.

Lasta parolinto dum tiu laborkunsido estis s-ro A. Gelfand, Delegito de UEA en Baranowicze, kiu proponis fondi akcian societeton por fabrikado de pri-Esperantaj filmoj.

Posttagmeze denove okazis kunsido de la Ĝenerala Estraro de la Esperanto-Movado, de Lingva Komitato sub prezido de s-ro Warden kaj multaj fakkunsidoj de Bahaanoj, scienculoj, Oomotanoj, homaranoj k. t. p.

Vespere la Kongresa Komitato prezentis al la kongresanaro vere unikan ĝuon. Sur la antikva korto de la malnova reĝa kastelo Wawel okazis koncerto de pola muziko. Tiel la muziko, kiel ankaŭ la eksterordinara emociiga loko, forte impresis la diversnecian publikon.

### SESA KONGRESTAGO.

La jaŭdan kongresan tagon komencis kunveno de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. La kunveno estis bone aranĝita kaj

la paroladoj de eminentaj kuracistoj-Esperantistoj pritraktis seriozajn medicinajn problemojn. Kun ĝogo ni ĉiam konstatas la bonan disvolviĝon de tiu tre grava Asocio, kiu havas bonan famon ankaŭ en la neesperantistaj rondoj. Ja ĉiu numero de „Internacia Medicina Revuo“ alportas aron da intereseĝaj referatoj de kuracistoj el la tuta mondo kaj faras bonegan impreson je ĉiu kuracisto, ĉu Esperantisto aŭ ne. Niaj propagandistoj ne forgesu pri tiu bonega organo, kiu povas servi kiel ekzemplo ankaŭ al aliaj fakaj gazetoj Esperantaj.

La saman matenon la vigla redakcio de la feliĉe nun reviviĝinta kaj tre plaĉe eldonata „Literatura Mondo“ aranĝis specialan literaturan feston. Ĝi estis bone vizitata kaj havis merititan sukceson.

La interesan programon partoprenis s-roj Rozmarynowski, Jean Forge-Fethke, f-ino Lidja Zamenhof, s-ino Coleman, Julio Baghy, K. R. C. Sturmer, J. Scherer, pastro Ĉe, Teo Jung, Tiberio Morariu kaj pastro Font Giralt.

Oni devas gratuli la redakcion de „Literatura Mondo“ pro aranĝo de tiu mateno. La Esperantistoj kuraĝigu la energiajn „literaturmondanojn“ per abono al tiu bela kaj interesa gazeto. Estas menciinde, ke pro la Kongreso la redakcio eldonis specialan „polan numeron“, kiu konatigis al la tutmonda Esperantistaro ekstraktojn el pola literaturo kaj arto. Dum speciala kunveno de polaj Esperantistoj vokita laŭ iniciato de Dro Mędrkiewicz, estis unuanime decidite danki al la redakcio de „Literatura Mondo“ pro eldono de pola numero kaj ĉiuforte subteni tiun tre bonan gazeton.

Posttagmeze, kiam en la Kongresejo okazis diversaj fakkunsidoj, la kuracistoj kun ĵurnalistoj kaj kelkaj aliaj gastoj partoprenis ekskurson de TEKA al la granda frenezulejo en Kobierzyn apud Krakovo.

La vizito al tiu moderna ŝtata malsanulejo faris je ĉiuj tre bonan impreson. La direktoro Dro Stryjeński, kiel ankaŭ la apartaj kuracistoj de la malsanulejo, afable gvidis la ekskursanojn tra ĉiuj senecepte fakoj kaj detale klarigis ĉion.

Antaŭ la reveturo oni regalis la vizitintojn per vespermanĝo, dum kiu Dro Blassberg, nia malnova pioniro de Esperanto inter kuracistoj, kore dankis en la nomo de ĉiuj al estraro de la malsanulejo pro ĝia afableco kaj atentemo al la Esperantistoj.

## BALO DE NACIOJ.

Vespere okazis la tradicia Esperanta balo internacia.

Ĝin vizitis ankaŭ multaj krakovanoj-neesperantistoj, kiuj vere ĝuis maloftan, ravan bildon. Belegaj, multkoloraj, diversspecaj kostumoj de ĉiuj nacioj brilis en la feste lumigita salono kaj prezentis plezuron al ĉies okuloj.

La neesperantaj vizitintoj povis „perokule“ konvinkiĝi, ke Esperanto estas jam disvastigita en la tuta mondo kaj ke la apartaj naciaj kulturoj povas tre bone firmi unu belan tuton. Same kiel la belegaj kostumoj kunmiksiĝis en unu belegan bildon, tiel ankaŭ la apartaj naciaj kulturoj helpe de internacia lingvo disvastiĝos tra la mondo, vekante ĉe la nacioj ŝaton kaj estimon reciprokan kaj formante kune belan tuthomaran kulturon.



Sonoj de du bonaj orkestroj efikis, ke la verdŝtelanoj tre fervore partoprenis la dancadon. Krom dancoj, internacie konataj, apartaj naciaj paroj prezentis siajn popolajn dancojn.

Jugantaro, eksidinta kun severaj mienoj por aljuĝi premiojn por plej belaj naciaj kostumoj, havis grandegan elekton. Unua premio estis aljuĝita al f-ino Rina Kovačeva el Bulgarujo. Per dua premio estis distingita hungara kaj per tria estona kostumo. Polaj naciaj kostumoj ne partoprenis la konkurson, kio estas imitinda ekzemplo de ĝentileco, montrita de la gastigantoj.

Je kvina horo matene oni ankoraŭ dancis...

### SEPA KONGRESTAGO.

Antaŭtagmeze okazis la tria laborkunsido.

Post parolado de s-ro Brauer pri ŝlosiloj, la prezidanto s-ro Merchant informis la ĉeestantojn, ke s-ro Warden estas elektita prezidanto de Lingva Komitato kaj de la Akademio. Tiu novaĵo estis aklande salutita.

La nova prezidanto de niaj lingvaj institucioj prezentis raporton por la pasinta jaro. Tiu raporto estas la lasta, kiun skribis la bedaŭrinde nun ne plu vivanta, sed neniam por ni forgesebla, prof. Cart. La raporto estis unuanime akceptata.

La Direktoro de I. C. K. s-ro Robert Kreuz parolis pri la temo: „Kiel propagandi pli efike? Ĉu Esperanto progresas?“. Kontraŭ la ofte aŭdata alia opinio li pruvas, ke Esperanta movado multe progresas kaj donas konsilojn pri plej efika propagando.

Sinjoro Franc Schoofs, anstataŭante la nevenintan Dron Höke, prelegis pri „Esperanto kaj stenografio“.

### EKSKURSO AL SALMINEJOJ EN WIELICZKA.

Je unua horo posttagmeze speciala vagonaro lorveturigis la kongresanojn al Wieliczka, kie en la stacidomo reprezentantoj de la regna administracio, urbo kaj de salminejoj kore salutis la alvenintojn. Salmineja orkestro ludis je honoro de la gastoj la „Esperon“, knabinetoj en naciaj kostumoj prezentis florbukedojn.

Post komuna marŝado al salminejo komenciĝis „enteriĝo“ (ne timu, atentaj legantoj!) de la kongresanoj. Mineja liŝto fulmrapide malsuprenigadis po ses kongresanoj. Baldaŭ jam ĉiuj kelkcent estis malsupre.

Komenciĝis vagado tra longaj koridoroj interne de la tero. Oni trapasis diversajn kapelojn kaj ĉambrojn, ĉiujn faritajn el salo. Kvazaŭ en sorĉa lando oni vidis belegan preĝejon subteran, kie ne nur la muroj sed ankaŭ la altaro, lampoj, sanktaj figuroj kaj ĉio cetera estas farita de la ministroj el salo.

Fine la diversnacia kongresanaro venis al grandega balsalono, kie ludis bona orkestro. Profunde de la tero la Esperantistoj komencis fervore danci. Malgraŭ la ioma laciĝo pro longa vagado tra subteraj koridoroj la piedoj rapide ekmoviĝis laŭ takto de la muziko kaj la Esperanta piedmovado disvastiĝis tra la tuta salonego, kie cetere malgranda parto de praktikaj Esperantistoj dume okupiĝis pri satigo de sia apetito kaj pri skribado de poŝtkartoj, supren al la tero ekspedotaj.

Cirkaŭrigardante la grandegan salonon, mi rimarkis strangan fenomenon: kelkaj paroj, dancante, subite kvazaŭ elvapiĝis. Ili ne

plu estis videblaj. Mi streĉis miajn vid — kaj aŭdsentojn kaj — jen, ion mi ekaŭdis...

Sed ne, certe nur ŝajnis al mi, ke mi aŭdetis ies murmuretaĵon kaj kvazaŭ eĥon de kiso. Certe nur ŝajnis al mi, same kiel io simila ankaŭ nur ŝajnis al la kunlaborinto de iama bonega „Lingvo Internacia“ Ned Katryn, kiam li antaŭ 19 jaroj priskribis la ekskurson al Wieliczka dum nia Oka.

La ekskurso plene kontentigis ĉiujn partoprenintojn.

### FERMA KUNSIDO.

Sabato.

Jam lasta tago de la Kongreso! Rapide, nerimarkite pasis la tempo en amika rondo.

Lasta, ferma kusido de la Kongreso. Prezidas s-ro Merchant.

Estas akceptata propono de s-ro Indra, ke la 2-a de Junio, la tago de apero de nia lingvo, estu de nun „tago por la propagando de Esperanto“.

S-ro Merchant komunikas, ke ICK decidis nunjare honori per ora medalo prof. Christaller, la Germanan Esperanto-Instituton kaj la familion Zamenhof. Longa, forta aplaŭdado sekvas.

Prof. Bujvid kortuŝe dankas al la kongresanoj kaj al la gvidantoj de nia movado, helpintaj al la sukcesigo de la Kongreso.

S-ro Schoofs varme alvokas, ke la landaj societoj vigle kunlaboru kun la delegitoj de UEA por bono de nia afero.

S-roj Ŝapiro kaj Dratwer invitas la kongresanojn partopreni la postkongresojn en Białystok kaj Varsovio.

Blinda samideano s-ro Hasselbach dankas en la nomo de blindaj samideanoj al la aranĝantoj de la Kongreso pro montrita al ili helpo kaj komplezemo. Li mencias speciale la nomojn de prof. Bujvid kaj de f-ino Weinsberg.

Fine faras belan adiaŭan paroladon s-ro Feliks Zamenhof, frato de la Majstro, kiun oni longe kaj multe aplaŭdis.

La prezidanto s-ro Merchant deklaras, ke la Kongreso estas finita.

Oni premas reciproke la manojn. Deziroj de feliĉa hejmvoyaĝo kaj de revido en Parizo dum la XXIV-a plenigas la ĉambregon. Kun novaj fortoj, kun nova espero, kun nova energio la gekongresanoj disveturas al siaj hejmaj lokoj por pluen varbi kaj labori por nia sankta afero.

La XXIII-a bone sukcesinta Kongreso Esperantista en la urbo de la Oka kaj lando de Zamenhof apartenas nun jam al la historio.

J. Ŝapiro.

## INTERNACIA ESPERANTA POSTKONGRESO EN WARSZAWA.

Post la Universala Kongreso en la malnova urbo Krakovo multaj esperantistoj sekvis la alvokon de la ĉefurbo Varsovio kaj alvenis tien por partopreni la Internacian Esperantan Postkongreson. Jam la 8-an de aŭgusto tuj post la fermo de la Kongreso, apenaŭ sukcesinte tagmanĝi la postkongresanaro okupis



lokojn en la vagonaro al Varsovio. Agrablan surprizon al la gesamideanoj faris la radio-sendstacio de la vagonaro, kiu „konkerita“ de kelkaj esperantistoj disaŭdigis esperantajn himnon, kantojn kaj spritaĵojn. Sur perono de la stacidomo de Varsovio funkciis informoficejo kaj la alvenintajn gastojn atendis gejunuloj, kiuj akompanis ilin al la hoteloj. Ni notu, ke la hotelo „Britania“, kie loĝis multaj gesamideanoj, sendis ŝarĝaŭtomobilon por valizoj k. t. p.

La 9-an de aŭgusto je 9-a horo matene la postkongresanoj kolektiĝis sur la Teatra Placo, kie en la urbdomo troviĝis akceptejo, por per specialaj tramvagonoj veturi tra la urbo.

Precize je la 11-a horo la tramveturiloj alvenis al la tombejo, fermita por la vasta publiko, flirtis la verda standardo kaj troviĝis bonvensurskribo en tri lingvoj: pola, hebrea kaj esperanta. Ĝis la tombo kondukas aleo borderita de palm- kaj oleandrarboj speciale venigitaj de la Juda Komunumo, kiu ankaŭ zorgis pri tribuneno por gazetaro k. t. p. La solenaĵon komencas meto de florkrono en la nomo de la Postkongreso kaj belega impresplena parolado de nia oratoro s-ro Leo Belmont. Parolas ankaŭ en la nomo de la Juda Komunumo prezidanto s-ro Farbsztejn, en la nomo de la Societo de Amikoj de Ligo de Nacioj eksministro s-ro Lednicki, direktoro de I. C. K. s-ro Robert Kreuz. Poste sekvas paroladoj de reprezentantoj de pli ol 20 nacioj el 4 kontinentoj. La solenaĵo sur la tombo de la Kreinto de Esperanto enhavis multajn kortuŝajn momentojn, dum kiuj ne unu samideano aŭ samideanino kaŝe viŝis larmojn.

Post la solenaĵo ĉiuj ekiris al la Zamenhofa strato, kie estas fiksita en la domo n-ro 9 memortabulo. Parto da gekongresanoj, profitante la liberan tempon antaŭ la malkovro de la tabulo sukcesis ankaŭ viziti la tombon de Antoni Grabowski. Preskaŭ ĉiuj balkonoj de la najbaraj domoj estis ornamitaj per tapiŝoj, standardoj k. t. p. S-ro Leo Belmont en la nomo de la Organiza Komitato de la Postkongreso transdonas al la urbo la memortabulon. Magistratano d-ro Bychowski, kiu reprezentis la forveturintan urbprezidanton, depreninte la tolon malkovris la marmoran tabulon kun surskribo en pola lingvo: „En tiu domo loĝis d-ro Ludoviko Zamenhof, Kreinto de la lingvo internacia Esperanto“. S-ro Bychowski faris paroladon en Esperanto. Post parolado de direktoro de I. C. K. s-ro Robert Kreuz kaj himnokantado finiĝis la solena malkovro de la memortabulo en la domo, kie dum multaj jaroj loĝis kaj laboris nia neforgesebla Majstro.

Post komuna tagmanĝo en restoracio „Gastronomja“ okazis mallongdaŭra kunsido en salono de la urbdomo, dum kiu sprite parolis s-ro Leo Belmont kaj s-ro J. Litauer skizis sian projekton de Orienteŭropa Esperanta Federacio.

Vespere okazis en restoracio „Varsovia“ senĝena kunveno, kunligita ankaŭ kun negranda koncerta parto.

La tuta lunda tago estis dediĉita al vizitado de la urbo. Notinde estas, ke la gekongresanoj profitis de la senpaga eniro en la Kastelon kaj palacojn. Vespere okazis prezento de la Folkloro Teatro, ankaŭ senpaga por la postkongresanoj.

Marde, la 11-an de aŭgusto okazis ekskurso al Wilanów, kunligita kun vizito de la reĝa palaco. Vespere, ankoraŭ ne forveturintaj

gesamideanoj kolektiĝis en la kafejo „Italia“ por kune pasigi la lastan vesperon de la Postkongreso.

En multaj gazetoj aperis pli aŭ malpli longaj artikoloj kaj fotografajoj pri la Postkongreso.

Esperable, ke la partoprenintoj de la Internacia Esperanta Postkongreso agrable rememoros pri la pasigitaj kelkaj tagoj en la ĉefurbo de Polujo.

I. Dratwer.

## II INTERNACIA POSTKONGRESO ESPERANTISTA EN BIAŁYSTOK.

**N**i ricevis nun detalan raporton pri la tre impresigaj solenaĵoj en Zamenhofa naskurbo, kiu certe interesos nian legantaron.

La 12-an de Aŭgusto je 10,15 matene alvenis Białystokon el Varsovio karavano de ĉ. 60 partoprenintoj de la XXIII Universala Kongreso Esperantista. La karavanon, por kiu estis rezervitaj apartaj kupeoj en la vagonaro, gvidis la vicprezidanto de Białystoka Postkongreso dro Ŝ. Datner.

Kiam la vagonaro alproksimiĝis al la stacidomo, militista orkestro de 42a regimento ekludis Esperantomarŝon je honoro de la gastoj. La alvenintojn ĉe elvagoniĝo salutis la organiza komitato kun prezitanto J. Szapiro, reprezentantoj de la urbo kun vicprezidanto de la urba konsilantaro dro Rajgródzki, delegitoj de milita, fervoja k. a. estraroj kaj multnombraj lokaj Esperantistoj. La orkestro ekludis „La Esperon“, kiun ekkantis ĉiuj ĥore.

La stacidomo estis bele ornamita per polaj kaj Esperantaj flagoj kaj per granda surskribo en Esperanto „Bonvenon!“.

Rapide estis disdonitaj al ĉiuj hotelkartoj ĉe speciala informejo, aranĝita en la stacidomo, post kio la gastoj estis forveturigitaj al siaj loĝejoj. Specialaj gvidantoj akompanis la gastojn.

La urba loĝantaro amase kolektiĝis dumvoje por saluti la Esperantistojn, venintajn por honorigi la plej grandan filon de Białystok. Grandaj rubandoj kun salutsurskriboj pendis tra la stratoj. Sur la alta urba turo, troviĝanta en la centro de la urbo, flirtis grandega verda Esperanta standardo, afable alsendita por tiu celo de s-ro Onnen, la nederlanda Ĉefdelegito de UEA.

### EN LA AKCEPTEJO.

Baldaŭ komenciĝis ankaŭ movado en la kongresa Akceptejo ĉe Zamenhofa strato No 14 A, kompreneble ankaŭ konforme ornamita. Tie ĉiu kongresano ricevis dikan koverton kun siaj kongresdokumentoj: insignon, prezentantan blazonon de Białystok kaj Esp. stelon kun datoj de la Postkongreso, Postkongresan libreton kun programo kaj diversaj informoj, speciale pro Postkongreso eldonitan gvidilon tra Białystok kun bildoj k. t. p.

En unu el la kvar ĉambroj de la vasta Akceptejo estis eĉ aranĝita ekspozicio de bildoj de artpentristo-Esperantisto s-ro Tynowicki.

En la vendejo estis i. a. vendataj bildoj de Zamenhofa naskodomo pentritaj de la artistoj Tynowicki kaj Sadowski.



## LA SOLENO DE ZAMENHOF-MONUMENTO.

Ĉirkaŭ la tagmezo la gastoj komencis kolektiĝi ĉe la loko de l' estonta monumento. Tiu loko, elektita cetere de la vojevodo (provincestro) Marjan Zyndram-Kościałkowski, la honora protektanto de la konstruo de Zamenhof-Monumento, estas tre bele situita antaŭ la komenco de la grandega urba arbaro sur ronda placo ĉe kunkrucigo de ses stratoj.

La loko estis tre plaĉe ornamita per polaj kaj Esperantaj flagoj, multaj florpotoj kaj Esperantaj emblemoj. La ordo estis dum la tuta soleno modela dank' al honora taĉmento de la loka volontula fajrobrigado kaj dank' al la kunlaborantoj de la koncerna sekcio de la Organiza Komitato sub gvido de sekciestro s-ro Messer.

Meze de placo estis elfosita kavo, kie estis enmetota la fundamentoŝtono. Majstro-masonisto kun sia helpanto staris tie kun siaj iloj. Ŝtuparo kondukis malsupren al la kavo.

Malantaŭ la kavo staris alta tribuno por la parolantoj. Antaŭ la kavo — seĝego por la reprezentanto de la registaro kaj tablo, sur kiu kuŝis pergamena akto pri la soleno, speciala fina inko por skribi sur la pergameno kaj plumo.

Apud la tribuno sur videbla loko staris modelo de la estonta monumento. Ĝia aŭtoro estas fama varsovia artsulptisto A. Ostrze-ga. La monumento prezentos 12 metrojn altan Babelan Turon, kronatan ĉe supro per simbolo de Esperanto, la lingvo de paco kaj unueco. Sur la fronta parto en niĉo estos bareliefo de la Majstro kaj surskribo.

Al la soleno venis krom la Esperantistoj ankaŭ reprezentantoj de la registaro, de urbestraro, diversaj oficialaj institucioj, organizajoj k. t. p.

Kiam alvenis la vicvojevodo Czesław Zawistowski, anstataŭanta la forestantan de Białystok pro kuracado vojevodo, la militista orkestro salutis lin per marŝo, post kio la vojevodo, renkontita ĉe la eniro al la placo de la Organiza Komitato, subskribis la akton pri la soleno. Sekvis subskriboj de aliaj regnaj, urbaj kaj Esperantaj eminentuloj.

### PAROLADO DE VICVOJEVODO S-RO ZAWISTOWSKI.

Post tio la vicvojevodo s-ro Zawistowski suriris la tribunon por fari la jenan oficialan paroladon pollingve, tradukitan tuj poste Esperanten de la prezidanto de Org. Komitato s-ro J. Šapiro:

„Ni metas hodiaŭ la fundamentan ŝtonon de monumento por la kreinto de la lingvo Esperanto dro Ludoviko Zamenhof, kies tre konscia laboro por la bono de la homaro, komencita antaŭ kelkdek jaroj sur restanta tiutempe en mallibero pola tero, mirinde kunplektiĝas kun la penoj, farataj de ni depost la reakiro de sendependeco de Polujo por afero, vive interesanta multajn popolojn.

Dro Zamenhof, filo de nia tero kaj bialystokano, gvidata de altaj ideoj pri konstruo de konkorda kunvivado de popoloj, donis al ili kion tiuj popoloj deziris kaj serĉis — la eblecon interŝanĝi pensojn kaj ties riĉaĵojn helpe de unu lingvo, servonta al la paco.

Eble nenie en la mondo vi trovas en tia grado, kiel en la hodiaŭa Polujo, tiom grandan adoron de la ideo pri paco kaj deziron de ideinterŝanĝo kun aliaj popoloj, kiel ankaŭ bonan volon bazi la

internaciajn rilatojn sur la fundamento de respektado de la juro. Tial ankaŭ ne malpli ol aliaj popoloj ni komprenas la signifon de Esperanto kaj ni fieras, ke ĝia kreinto vivis kaj laboris inter ni.

Kaj ĝuste pro tio, inaŭgurante la hodiaŭan solenon de meto de la fundamentoŝtono por monumento de Dro Zamenhof, mi permesas al mi mencii, ke tiu monumento, kiu baldaŭ ekstaros sur tiu-ĉi loko, estos nur simbolo de alia monumento, de monumento, kreata de vi, ĝesinjoroj, kiuj disvastigas la ideon de Dro Zamenhof inter la popoloj, kiujn vi reprezentas.

Mi deziras al vi, ĝesinjoroj, ke tiu alia monumento estu de vi firmigita kiel eble plej baldaŭ sur la senlimaj terspacoj de la mondo por realigo de plej altaj idealoj de la homaro".

Multa aplaŭdego kaj sonoj de pola kaj Esperanta himnoj sekvas la finon de la parolado de la alta registara reprezentanto.

### **PAROLADO DE LA VICURBESTRO DRO ZIEMILSKI.**

Poste faris paroladon en la nomo de la urbo Białystok la vicurbestro dro Maksymiljan Ziemilski, tradukitan Esperanten de vicprezidanto de la Org. Komitato dro Datner:

„Ĉiu granda verko havas du gravajn momentojn: tiun de la komenco kaj de la efektiviĝo.

Nun ni estas la atestantoj de la unua momento. Ni metas fundamentan ŝtonon de la monumento al granda filo de Białystok Dro Ludoviko Zamenhof.

La hodiaŭa soleno restas sub la signo de Universala Kongreso Esperantista en Krakovo, kiu pruvis la gravecon de la eltrovaĵo de Dro Zamenhof por la kultura disvolviĝo de la mondo kaj por la ideo de kunfratigo de la popoloj. Parolante pri Zamenhof ni konsideras lin ne nur kiel grandan homon, sed ankaŭ kiel enkorpiĝon de granda ideo, kiu preskaŭ de la vivkomenco de la homaro estis la celo de revoj de scienculoj kaj poetoj.

Kiel simbolo de tiu ideo ekstaros tie-ĉi monumento, montranta la Babelan Turon. Ekstaros tie-ĉi, kie finiĝas la malnova Białystok kaj komenciĝas la nova, ĉirkaŭita per multa verdaĵo, kvazaŭ la naturo mem volus honorigi la verdan koloron Esperantan.

Do estu tiu monumento ne nur plibeligilo de la urbo, sed ankaŭ eterna memorigilo por la nunaj kaj venontaj generacioj pri la granda ideo de Zamenhof.

En la nomo de la urbo mi esprimas al la Komitato dankon por disponigo al la urbo de tiel bela verko, mi dankas al la eksterlandaj gastoj por ilia alveno kaj mi deziras, ke jam baldaŭ ni estu atestantoj de la dua momento — de la soleno de inaŭguro de jam preta monumento".

### **PAROLADO DE DIREKTORO DE I. C. K. S-RO KREUZ.**

Poste parolis la Direktoro de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado s-ro Robert Kreuz, kiu en la nomo de I. C. K. esprimis la dankemon de la tutmonda Esperantistaro al la patrujo de Zamenhof pro la deca honorigo de la genia aŭtoro de Esperanto. Li aparte dankis la aŭtoritatulojn de Białystok kaj la lokan Organizan Komitaton.

La bela parolado estis multe aplaŭdita kaj akompanita de ludo de Esperanto-Himno, ludita de la milita orkestro.



## LA AKTO PRI LA MONUMENTO-SOLENO.

Sekvis laŭtelegado de la akto pri fundamentometado. La akto estas arte skribita de grafikisto I. Tynowicki, membro de la Organiza Komitato, sur pergameno en du lingvoj pola kaj Esperanto.

La teksto de la akto estas jena:

„En la vojevoda urbo Białystok en la jaro mil naŭcent tridek unua post Kristnasko, dektria post revivigo de Sendependa Polujo kaj la kvardek kvar post la apero de la unua lernolibro de lingvo internacia Esperanto la dekduan de Aŭgusto, kiam la Prezidanto de la Pola Respubliko estis profesoro Ignacy Mościcki, la Unua Marŝalo de Polujo Józef Piłsudski, la Prezidanto de la Ministraro Aleksander Prystor, la Vojevodo Białystoka Marjan Zyndram-Kościałkowski, la Starosto Urba Jan Mieszkowski, la Urba Prezidanto Wincenty Hermanowski, Prezidanto de la Urba Konsilantaro Prof. Roman Młyński, Prezidanto de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado John Merchant, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Eduard Stettler, la Prezidanto de Pollanda Esperanto-Delegitaro kaj de Internacia Scienca Asocio Esperantista Prof. Dro Odo Bujwid, Ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio por Pola Teritorio Jakob Šapiro, okazis en la ĉeesto de Regnaj Aŭtoritatoj, Rerezentantoj de la Socio kaj eksterlandaj gastoj SCLENA ENTERIGO sur tiu ĉi loko de fundamenta ŝtono sub Monumento por Dro Ludoviko Zamenhof, kreinto de la Helpa Lingvo Internacia Esperanto, naskiĝinta en la jaro mil okcent kvindeknaŭa en Białystok, laŭ projekto de artisto-skulptisto Abrahamo Ostrzeża de la ĉefurbo Varsovio". Subskriboj: Zawistowski, Vicvojevodo Białystoka. Jan Mieszkowski, starosto urba. St. Michałowski, starosto distrikta. Inĝ. Wąsowski, direktoro de vojevoda oficejo por publikaj laboroj. Dro Leon Zamenhof. Rob. Kreuz, L. K., direktoro de I. C. K. Geneve. J. Šapiro, ĈD de UEA kaj Prez. de Org. Kom. de Zamenhofa Monumento, Dro Maksymiljan Ziemilski, vicprezidanto de la urbo. Rychter, majoro. Krzyżanowski, kavaleria kapitano. F. Świtalski, prezidanto de Financa Ĉambro. Dro A. Rajdrodzki, vicprezidanto de la Urba Konsilantaro.

## ENMURIGO DE LA FUNDAMENTOŝTONO.

Dum streĉita atento de ĉiuj ĉeestantoj la vicvojevodo s-ro Zawistowski subiras per la ŝtuparo en la kavon kaj tie enmurigas la superciritan akton, kiu estas enmetita en du tuboj, unu vitra kaj dua ekstera el lado. Krom tio li enmurigas ankaŭ la unuan brikŝtonon por la fundamento.

La sekvantajn brikojn enmurigas la reprezentantoj de la urbo kaj ŝtata administracio, familio Zamenhof (dro Leono kaj f-inoj Lidja kaj Sofio), I. C. K. (direktoro Robert Kreuz) kaj de apartaj nacioj, venintaj al la Postkongreso. La belga delegitino s-ino Staes enmetis kun la briko ankaŭ multekostan hindan ŝtonon en la nomo de hindaj Esperantistoj. La delegito de norvegaj Esperantistoj enmurigis brikon, venintan flugpoŝte el Norvegujo.

La soleno estis tre impresiga kaj forte emociigis ĉiujn, tiel Esperantistojn, kiel ankaŭ la ceteran publikon.

## KOMUNA TAGMANGO.

Poste la Esperantistoj kaj reprezentantoj da la registaro kaj de la urbeŝtraro kolektiĝis en restoracio „Ritz" por komuna tagmango.

Dum la tagmanĝo tostojn faris prezid. de Org. Komitato s-ro J. Šapiro kaj direktoro de I. C. K. de la Esp. Movado s-ro Robert Kreuz.

### VIZITADO DE ZAMENHOFA NASKODOMO.

Post la tagmanĝo ĉiuj partoprenantoj vizitis la urbon, i. a. la belegan vojevodan palacon kaj apartenantan al ĝi parkon.

Plej interesa punkto de la vizitado estis kompreneble la Zamenhofa naskodomo, feste ornamita.

Kun kortuŝo la diverslandaj samideanoj vizitis la malriĉan kabanon, en kiuj antaŭ multaj jaroj naskiĝis nia Majstro. En la loĝejo en la iama dormoĉambro de Zamenhofoj kuŝas nun sur tableto speciale por la Postkongreso preparita „Orã libro de vizitantoj“, kie de nun subskribos ĉiu, vizitanta tiun historian dometon.

### SOLENA POSTKONGRESA KUNSIDO.

Je 6-a horo vesp. en salono de la urba konsilantaro okazis sole-na kunsido de la Postkongreso.

Ĝin inaŭguris la prez. J. Šapiro, kiu dankis al la gesamideanoj, venintaj el plej diversaj landoj por honorigi la memoron de la Majstro. Antaŭ kvar jaroj, dum la I Internacia Postkongreso Esp. en Białystok post la XIX-a en Danzigo, białystoka Esperantistaro promesis al la tutmonda gesamideanaro starigi kiel eble plej baldaŭ monumenton al Dro Zamenhof. Nun, tiu ideo efektiviĝas. La fundamenta ŝtono estas metita. La finpretigo de la tuta monumento estos dependa de la tutmonda Esperantistaro, kiu devas helpi al la organiza komitato.

Poste estis laŭtleĝita telegramo de la vojevodo białystoka s-ro Marjan Zyndram-Kościałkowski:

„Neebleco interrompi la kuracadon malpermesas al mi ĉeesti. Mi salutas la alvenintojn al Białystok Esperantistojn per deziro ke la disvolviĝo de esperantismo helpu la alproksimiĝon de popoloj, alportante pacon kaj amon, tiel necesan por la homaro“.

La reprezentanto de la vojevodo administracia fakestro dro Raczyński faris la jenan paroladon:

„Kiel partoprenintoj de la Universala Kongreso Esperantista en Krakovo vi venis, gesinjoroj, białystokan vojevodan regionon por okazigi Postkongreson en la naskurbo de la aŭtoro de Esperanto dro Ludoviko Zamenhof kaj por partopreni la solenon de meto de fundamentoŝtono por Lia monumento.

Vi estas do niaj gastoj kaj mi salutas vin des pli kore, ke vi estas proksimaj al ni per la komuneco de la celado al laborado por la ideo de kunfratiĝo de popoloj kaj de akcelado de ilia paca kunvivado pro altaj idealoj, kiuj ĉiam gvidis kaj gvidas ankaŭ nun la polan popolon.

Vi disvastigas lingvon, kiu devas servi al la afero de reciproka alproksimiĝo de popoloj kaj de interŝanĝado de iliaj kulturaj valoroj kaj de reciproka ekkono, kio rapide kondukos al kunvivado kaj amikeco.

Per tio estu klarigata la vera koreco, kiun vi renkontis ĝis nun en Krakovo, Varsovio kaj aliaj urboj polaj, kiun vi renkontas nun en Białystok kaj kiu akompanos vin dum vi vizitados la vere belajn



angulojn de białystoka vojevoda regiono: la Białovjejan praarbaregon kaj la lagojn de Augustovo kaj Sувалькі.

Salutante vin, mi samtempe deziras, ke el białystoka vojevoda regiono kaj el la tuta Polujo vi kunportu komprenon por la beleco de nia lando kaj la konvinkon, ke ĉiuj viaj laboroj por bone komprenita utiligo de Esperanto trovos niaflanke konforman komprenon kaj subtenon".

La vicurbestro dro M. Ziemilski faris post tio sekvantan salutparoladon:

„En la nomo de la urbo mi salutas vin, ĝesinjoroj, kiuj venis de malproksime al nia modesta urbo por viziti la naskurbon de Dro Zamenhof kaj por esti atestantoj de la soleno de metado de fundamentostono por monumento al la granda homo.

Nia urbo, malzorgita dum la regado de rusa cara registaro kaj malprosperanta nun pro la ĝenerala ekonomia krizo kaj pro cirkonstancoj, speciale malfavoraj por la białystoka industrio, havas tamen belan historian tradicion kaj komprenon por grandaj ideoj kaj por altaj ideoj.

Post la belega, inda Krakovo, post pulsanta per ritmo grandurba Varsovio vi vizitas malriĉan Białystokon. Ni deziras, ke ankaŭ nia urbo restu en via agrabla rememoro, la urbo, kiu per tiom da memorajoj estas ligita kun la persono de la Majstro.

Dezirante al vi plej agrablajn impresojn dum la restado en Białystok kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo, mi vokas:

Vivu eterne la memoro de la granda, nobla homo Dro Ludoviko Zamenhof!

Vivu la Homfratiga ideo inter la popoloj!"

Sekvis paroladoj de direktoro de I. C. K. s-ro Robert Kreuz, de Dro Leon Zamenhof kaj de reprezentantoj de Esperantistoj de apartaj landoj. La naciaj reprezentantoj salutis en Esperanto kaj en sia nacia lingvo.

### ESPERANTA PREZENTADO.

Post komuna vespermanĝo en kafejo „Lux" okazis en la ejo de kinoteatro prezentado de Esperanto-Revuo-Teatro ĉe Zamenhofa Esperanto-Societo en Białystok. Ĝin reĝisoris tre bone s-ro Ŝ. Osovicki. Muzikgvidanto estis s-ro M. Hiller. Propraj dekoracioj, pentritaj de komitatano s-ro Tynovicki plibeligis la tuton.

La programo konsistis el aro da kantnumeroj kaj fragmento el la opereto „Ho, tiuj fremduloj!". La aŭtoro de tiu opereto s-ro Feliks Hiller el Łódź ĉeestis la prezentadon kaj estis aplaŭde vokata de la multnombra publiko. La aŭtoroj de ceteraj tekstoj estis s-roj J. Baghy, I. Lejzerowicz, Raymond Schwartz kaj F. K.

La programon bone plenumis, rikoltante multajn aplaŭdojn f-ino T. Boroviĉ, I. Esteroviĉ, S. Javorovska, S. Mekler, G. Miller, R. Porozowska, R. Ŝevc kaj s-roj S. Apfelbaum, B. Halpern, M. Dargujański kaj Ŝ. Osovicki.

### BALO EN LA VOJEVODA PALACO.

La tre ampleksan programon de la Postkongreso finis balo en la reprezentaj salonoj de la historia palaco de Branicki, nun sidejo de vojevodo.

La gastoj bone amuzis sin, dancante ĝis mateniĝo. La balon partoprenis ankaŭ lokaj aŭtoritatoj.

### EKSKURSO AL LA ARBAREGO DE BJALOVJEJA.

Sekvantan matenon du grandaj aŭtobusoj forveturigis la gastojn al la mondfama Bjalovjeja arbarego, kie reprezentanto de la regna arbardirekcio inĝ. Jasiński gvidis la Esperantistojn tra la arbarego kaj montris al ili la urojn, kiuj nun estas granda maloftajo. La kongresanoj vizitis ankaŭ la iaman caran palacon kaj interesan muzeon.

### FAVORA SINTENADO DE LA GAZETARO.

Estas menciinde, ke la loka gazetaro montris grandan intereson kaj simpaton por la Postkongreso. Ĉiuj gazetoj presigis salutartikolojn en Esperanto. Gazeto „Głos Ziemi Białostockiej” presigis eĉ specialan 16-paĝan Esperantan eldonon, la gazeto „Dziennik Białostocki” faris specialan Esperantan numeron kun ilustraĵoj.

## 23-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

### KONGRESA BULTENO.

Adreso por ĉiuj korespondantoj prikongresaj restas la sama, t. e. str. Lubicz 34, Kraków.

Dokumentoj kongresaj estas liveritaj al ĉiuj aliĝintaj, sed ne alvenintaj kongresanoj. —

Raportoj. — Gesamideanoj estas insiste petataj sendi al ni po 2 ekzempleroj de ĉiu gazeto (nacilingva aŭ esperanta), kiu enhavas raporton pri la 23 Kongreso. — Eventualajn kostojn ni rekompencos.

### FINA LISTO DE ALIĜINTOJ:

- 515 Steiner Dro. Karl, Praha VII, Tusarova 46. Ĉ-Sl.
- 516 Jankowski Waclaw, Poznań, Reja 4. Pollando.
- 517 Anjer Ludwig, Fjösanger, Norvegujo.
- 518 Pamporov Petro, Sofia, Opalcenska 66. Bulgarujo.
- 519 Fischer Karl, Danzig, Weidengasse 16.
- 520 Leclere Rene, Rosny s/Bois, Rue J. J. Rousseau. Francujo.
- 521 Berry Evelyn, Haslingden, Blackburn 325. Anglujo.
- 522 Owen Morris, Ralph Montagu, Wangoed, Eizianpon. Anglujo.
- 523 Meek H. H., Hastings, Linton Road 14. Anglujo.
- 524 Meek A., Hastings, Linton Road 14. Anglujo.
- 525 Heslop Joan Fearon, Barrow, Victoria Road 7. Anglujo.
- 526 Eichert Maria, Warszawa, Senatorska 28/30. Pollando.
- 527 Czubryński Dro. Antoni, Garwolin. Pollando.
- 528 Pogoda Józef, Berlin-Steglitz, Wrangelstrasse 6—7. Germanujo.
- 529 Niomura Iuiti, Leipzig, Emilienstrasse 28. Germanujo.
- 530 Sturmer K. R. C. London SW. 3, Gleebe Place 40, Anglujo.
- 531 Heide Marta, Wien VIII, Josefs-gasse 7. Aŭstrio.
- 532 Lindegren Eira, Stockholm, Frey-gatan 37. Svedujo.
- 533 Maly Frantisek, Rrno, Wojanowa 13. Ĉ-Sl.
- 534 Furmanik Adam, Plock, Dobrzyńska 29. Pollando.
- 535 Lesiński Aron, Włocławek, Plac Wolności 12. Pollando.
- 536 Persson Frida, Torskers, Inglotorp, Svedujo.
- 537 Zetterlund Almida, Stockholm, Kocksgatan 35 b. Svedujo.
- 538 Hasegawa Yotaro, Fusan, Kusabacho 3. Japanujo.
- 539 Maske Brunon, Rogóžno, M. Poznańska 327. Pollando.
- 540 Czubek Stanislaw, Warszawa, Czerniakowska 152/4. Pollando.
- 541 Emanuelson Artur, Boras, Lilla Brogatan 22. Svedujo.
- 542 Harabagiu H., Bucuresti, Bulev. Alex. ion Cuza 19. Rumanujo.
- 543 de Benedetto Dro. Vito, Lecce, Viale Lo Re 6, Italujo.
- 544 Bozzicholonna Baronino, Giovanna, Lecce, Viale Lo Re 6. Italujo.
- 545 Kawahara Dro. Jikichiro, Tokio Ikegami Mači, Senzoku 320. Japanujo.
- 546 Macfarlane Agnes G., Glasgow Wl., Dunbarton Road 785. Britujo.
- 547 Bartosik Dolf, Boršice a/Buchlowice. Ĉ-Sl.
- 548 Lacis Arnolds, Kazdanga, Lauksaim skola. Latvio.



- 549 Hay Emanuel, Żółkiew, Żółkiewskiego 2. Pollando.  
 550 Janowicz Kazimierz, Bydgoszcz, Dworcowa 46. Pollando.  
 551 Kasprzak Czesław, Poręba ad Zawiercie, Pollando.  
 552 Wasilewska Marja, Warszawa, Wilcza 56. Pollando.  
 553 Szymacher Perec, Włodzimierz Wof. Piłsudskiego 94. Pollando.  
 554 Bałajewiczowa Marja, Tarnobrzeg, Pollando.  
 555 Bober Karol, Trinec 243. Ć-Sl.  
 556 Buhr Frantisek, Praha XVIII, Belohorska 514. Ć-Sl.  
 557 Cheslyn Arthur Robert, Londyn, Northwold Road 141. Anglujo.  
 558 Kuma Andreo, Lwów, Złota 6. Pollando.  
 559 Bradshaw Ruth, London NW 8, Alma Square 5. Anglujo.  
 560 Pleskaczyński Tadeusz, Lublin, Bychawska 50. Pollando.  
 561 Kaciszak Tadeusz, Zakopane, Kościeliska, Pollando.  
 562 Epstein Henry, Vittel, Grand Hotel, Brasserie de la Renaissance, Francujo.  
 563 Rammi Olga, Estonio.  
 564 Enfors Nils, Svedujo.  
 565 Mayer Emil Władysław, Kraków, Lelewela 9/2. Pollando.  
 566 Körtz Bernhard, Leipzig C. 1, Salomonstrasse 15, II. Germanujo.  
 567 Garkinkel Helena, Łódź, Aleja 1 Maja 95. Pollando.  
 568 Merkert Elza, Łódź, Abramowskiego 39, Pollando.  
 569 Karo Aleksander, Łódź, Ogrodowa 3. Pollando.  
 570 Sołowiecz Romuald, Żychlin, Pollando.  
 571 Sołowiecz Walerja, Żychlin, Pollando.  
 572 Rosenfeld Szulim, Torczyn ad Łuck. Pollando.  
 573 Misiewiczówna Helena, Nowy Sącz, Łokietka 5, Pollando.  
 574 Meinesz Anna, s'Gravenhage, van Boetzelaarlaan 71. Nederlando.  
 575 ten Cate Henrik Jacob, s'Gravenhage, Blaricumsche plein 2. Nederlando.  
 576 Evans Beric Arthur Ernest, Oxford, Church str., St. Ebbes 24. Anglujo.  
 577 Bielokapov Mihail Zahariev, Samokov, Carica Ivanna 113. Bulgarujo.  
 578 Zanaška Rudolfo. Koprivnice, Masarykowa 87. Ć-Sl.  
 579 Kretinsky Franciska, Mor. Ostrava, Denisplaco 2. Ć-Sl.  
 580 Stary Vaclav, Praha, Zbraslav II. 191. Ć-Sl.  
 581 Johansen Dordi, Oslo, Pilestredet 55, ce Lange. Norvegujo.  
 582 Prengel Robert, Danzig, Langfuhr, Marienstrasse 23.  
 583 Fox Hans, Danzig, — Gletkann, Kapellenstrasse 1.  
 584 Stellacci Agostino, Napoli, Vicoletto Trinita Spagnoli 3. Italujo.  
 585 Englund Ester, Gävle, Dövmstumskolan. Svedujo.  
 586 Klein Alfred, Wien II, Heinestrasse 25/5. Austrio.  
 587 Anderwall Nils Robert, Rada, Basterud. Svedujo.  
 588 Agers Olga, Riga, Brivibas iela 126-23. Latvio.  
 589 Taubmanówna Fenja, Kraków, Przy moście 1. Pollando.  
 590 Hendrik Clemence, Gent, Zalmstraat 43. Belgujo.  
 591 Zuven Althen Pieternella, Delft, Piet Heinals 78. Nederlando.  
 592 Onderkówna Antonina, Kraków, Pollando.  
 593 Johansson Gunnar Rickard, Varberg, Skansgatan 9. Svedujo.  
 594 Feldman Dr. Guido, Jaworzno, Pollando.  
 595 Antoniewicz Janina, Kraków, Poselska 20. Pollando.  
 596 Fruchtówna Leonia, Lwów, Bartosza Głowackiego 34. Pollando.  
 597 Wiewiorowski Dro. Jerzy, Kraków, Łobzowska 27. Pollando.  
 598 Helebrant Józef, Praha, Vodickova 34. Ć-Sl.  
 599 Zavadilova Marie, Praha XI, Milicova 406. Ć-Sl.  
 600 Hovorka Nikolao, Wien IX/1 Löblichgasse 3. Austrio.  
 601 Kirsch Joachim, Cieszyn, Dr. Hinterstoisserstrasse 22. Ć-Sl.  
 602 Lewinski Mieczysław, Bydgoszcz, Cieszkowskiego 9. Pollando.  
 603 Nogalska Gertruda, Bydgoszcz, Cieszkowskiego 5. Pollando.  
 604 Prengel Franciszek, Bydgoszcz, Kościelna 1/4. Pollando.  
 605 Blassberg Stefano, Kraków, Starowiślna 18. Pollando.  
 606 Ezopówna Helut, Bydgoszcz, Siemiradzkiego 10. Pollando.  
 607 Sperling Zofia, Kraków, Św. Józefa 22. Pollando.  
 608 Kantorowicz Hanka, Kraków, Dietla 45. Pollando.  
 609 Krenicki Dro. Izak Ignacy, Warszawa, Nowy Świat 37. Pollando.  
 610 Römer Leo, Danzig, Englischer Damm 70.  
 611 Wehrauch Herbert, Danzig-Langfuhr, Heeresanger 70.  
 612 Oern Margit, Stockholm, Heleneborgsgatan 6. Svedujo.

- 613 Waldner Karl, Ljungkile, Svedujo.  
 614 Carlsten Ellen, Stockholm, Volmar Yxkullsgatan 16. Svedujo.  
 615 Bigaj Stefan, Czechowice Dziedzice 700. Pollando.  
 616 Schleichkorn Leon, Kraków, Długa 15. Pollando.  
 617 Schleichkorn Laura, Kraków, Długa 15. Pollando.  
 618 Schoofs Frans R., Antwerpen, Kl. Hondstraat 11. Belgujo.  
 619 Dereż Henryk, Łódź, Kilińskiego 77. Pollando.  
 620 Żbikowski Antoni, Lublin, Królewska 17. Pollando.  
 621 Żbikowska Helena, Lublin, Królewska 17. Pollando.  
 622 Feldstein Herman, Kraków, Kordeckiego 10. Pollando.  
 623 Mikowski Franciszek, Kraków, Siemiradzkiego 3. Pollando.  
 624 Wolfowicz Leontyna, Kraków, Lwowska 50. Pollando.  
 625 Brist Dolek, Kraków, Bzozowa 15. Pollando.  
 626 Badin Viktor, Nove Zamky, Corvin 5. Č-Sl.  
 627 Andersson Erik Emanuel, Malmö, Kungsgatan 31 V. Svedujo.  
 628 Kovacs Emilja, Pecs, F. Balokany 35. Hungarujo.  
 629 Lunyacsek Iren, Pecs, Felso Vamhaz 68. Hungarujo.  
 630 Navratil Frantisek, Breclav, Nadrazni 3. Č-Sl.  
 631 Mikosz Karol, Tarnobrzeg, Pollando.  
 632 Zieliński Zbigniew, Lwów, Kochanowskiego 26. Pollando.  
 633 Bergerówna Paulina, Kraków, Radziwiłowska 33. Pollando.  
 634 Labocha Julian, Częstochowa, Pollando.  
 635 Blassberg Anna, Kraków, Starowiślna 18. Pollando.  
 636 Bobrowska Bluma, Łódź, Zawadzka 35. Pollando.  
 637 Baghy Julio, Budapest IX, Rottenbiller 66. Hungarujo.  
 638 Fallot Mippe, Paris, Francujo.  
 639 Szapiro Anna, Warszawa, Solna 16. Pollando.  
 640 Potołowska Renia, Warszawa, Pańska 15. Pollando.  
 641 Gersohn Marja, Warszawa, Smocza 37. Pollando.  
 642 Bursztyn Marek, Włocławek, Tumska 15. Pollando.  
 643 Czarna Stefanja, Warszawa, Złota 65. Pollando.  
 644 Grünblat Ejdl, Warszawa, Nowolipki 28. Pollando.  
 645 Frenkel Hanka, Warszawa, Pl. Grzybowski 7. Pollando.  
 646 Tanenbaum Dora, Warszawa, Nowolipie 9. Pollando.  
 647 Grynblat Moriz, Warszawa, Zamenhofska 3. Pollando.  
 648 Płoński Michał, Warszawa, Solna 16. Pollando.  
 649 Brunner Helena, Warszawa, Niska 33. Pollando.  
 650 Berman Oskar, Warszawa, Muranowska 18. Pollando.  
 651 Lichtenstein Adam, Warszawa, Śliska 40. Pollando.  
 652 Krauzar Roza, Warszawa, Żelazna 85. Pollando.  
 653 Feigenblum Anna, Warszawa, Nowiniarska 8. Pollando.  
 654 Guterman Mojżesz, Warszawa, Pollando.  
 655 Mazur Mojżesz, Warszawa, Nowowiejska 26. Pollando.  
 656 Mazur Leib, Warszawa, Nowowiejska 23. Pollando.  
 657 Tichawski Jan, Katowice, Plebiscitowa 27. Pollando.  
 658 Lindb Dora, Warszawa, Ogrodowa 26a. Pollando.  
 659 Gelb Henrik, Warszawa, Namiestnikowska 7. Pollando.  
 660 Rezniuk Cesia, Lublin, Jezuicka 14. Pollando.  
 661 Resport Artur, Stryj, Wyspiańskiego 3. Pollando.  
 662 Resport Felicja, Stryj, Wyspiańskiego 3. Pollando.  
 663 Resport Celina, Stryj, Wyspiańskiego 3. Pollando.  
 664 Zimand Erna, Stryj, Potockiego 5. Pollando.  
 665 Schiff Helena, Kraków, Zacisze 12. Pollando.  
 666 Brandówna Barbara, Kraków, Długa 50. Pollando.  
 667 Pieniążek Mieczysław, Warszawa, pl. Kazimierza W. 4/72. Pollando.  
 668 Rosenthal Bronisława Dro. Kraków, pl. Jabłonowskich 2. Pollando.  
 669 Anisfeld Dora, Kraków, Jasna 10. Pollando.  
 670 Leibel Jakób, Kraków, Dietla 1. Pollando.  
 671 Uznańska Henryka, Kraków, Krowoderska 50. Pollando.  
 672 Dominik Elżbieta, Kraków, Pomorska 9. Pollando.  
 673 Bertig Cecylia, Kraków, Jarowa Wola 16. Pollando.  
 674 Birkenfeld Feliks, Kraków, Lwowska 15. Pollando.  
 675 Dreher Leopold Dro., Kraków, Starowiślna 37. Pollando.  
 676 Kuźma Orest, Kołomyja, Nowa 4. Pollando.



- 677 Hein Wincenty, Bochnia, Solna Góra 615. Pollando.  
 678 Christensen Parley Parker, Los Angeles, Grand str. 120. U. S. A.  
 679 Biernacki Dr. Henryk, Kraków, Studencka 25. Pollando.  
 680 Medyński Dr. W., Kraków, Szewska 27. Pollando.  
 681 Oczosiówna Monika, Lwów, Torosiewiczza. Pollando.  
 682 Grygosiński Józef, Częstochowa, Dąbrowskiego 11. Pollando.  
 683 Kurtiak Marja, Piaski k/Lublina. Pollando.  
 684 Wiśniewska Janina, Wierchowisko ad/Częstochowa. Pollando.  
 685 Sigalin Michał, Warszawa, Żoliborz, Krasińskiego 18/45. Pollando.  
 686 Herr Natan, Lwów, Piekarska 9. Pollando.  
 687 Lorentowicz Leonarda, Pabjanice, Poprzeczna 15. Pollando.  
 688 Ingster Dro. Adoli, Sosnowiec, Przejazd. Pollando.  
 689 Fleischer Eugenia, Kraków, Józefitów 16. Pollando.  
 690 Goldmann Paulina, Kraków, Józefitów 16. Pollando.  
 691 Ficowski Tadeusz, Warszawa, Filtrowa 47. Pollando.  
 692 Pastro Font Girald, Joan, Gerona, Katalunia.  
 693 Grzeszczak Zdzisław, Grudziądz, Ogrodowa 13. Pollando.  
 694 Czerwiński, Warszawa, Dobra 8. Pollando.  
 695 Dubynczanka Marja, Kraków, Prądnik Czerwony. Pollando.  
 696 Chruslińska Aniela, Kraków, Kazimierza W. 98. Pollando.  
 697 Baldinger Frydka, Kraków, Sebastjana 20. Pollando.  
 698 Feitel Berta, Lwów, Badenich 7. Pollando.  
 699 Nadel Laura, Lwów, Serbska 15. Pollando.  
 700 Aberdam Felicja, Lwów, Grodecka 24. Pollando.  
 701 Różanykwiat Aleksander, Warszawa, Długa 23. Pollando.  
 702 Szulc Samuelo, Bydgoszcz, Dworcowa 72. Pollando.  
 703 Czerwińska Alina, Warszawa, Dobra 8. Pollando.  
 704 Kahane Regina, Kraków, Krupnicza 14. Pollando.  
 705 Landau Baruch, Kraków, Krakowska 26. Pollando.  
 706 Mühlstein Róża, Kraków, Krakowska 26. Pollando.  
 707 Kronenberg Michalina, Bydgoszcz, Ossolińskich 15. Pollando.  
 708 Zawada Jan, Warszawa, Zaciszna 2. Pollando.  
 709 Przyborowski Józef, Toruń. Pollando.  
 710 Schüssler Antonina, Kraków, Rakowicka 19. Pollando.  
 711 Masuda Ryoichi, Tokio. Japanujo.  
 712 Roth Irena, Kraków, Dietlowska 113. Pollando.  
 713 Mieszaniec Władysław, Sosnowiec, Aleja 11. Pollando.  
 714 Osowski Wolf, Białystok, Żytnia 4. Pollando.  
 715 Jabłoński Eljasz, Białystok, Rybny Rynek 5. Pollando.  
 716 Pomeranc Ewa, Białystok, Piłna 28. Pollando.  
 717 Głęb Franciszek, Kraków, Zwierzyniecka 29. Pollando.  
 718 Bobola Tadeusz, Kraków, Zwierzyniecka 29. Pollando.  
 719 Bobola Julja, Kraków, Zwierzyniecka 29. Pollando.  
 720 Goldszajder Dora, Kielce, Hipoteczna 5. Pollando.  
 721 Rudner Ella, Wien, Tandelmarkt 8. Austrio.  
 722 Leser Henryk Dro. Zakopane. Pollando.  
 723 Szumacher B., Częstochowa, Kilińskiego 9. Pollando.  
 724 Fragner Dro. Izajasz, Wiśnicz pod Bochnią. Pollando.  
 725 Fragner Olga, Wiśnicz pod Bochnią. Pollando.  
 726 Pruc Bronisław, Nisko n/S. 3 Maja. Pollando.  
 727 Kostecka Zofja, Katowice, Wojciechowskiego 93. Pollando.  
 728 Gutman Mela, Kraków, Wąska 12. Pollando.  
 729 Langer Manjo, Trzebinia. Pollando.  
 730 Eisner Hanjo, Trzebinia. Pollando.  
 731 Rosenthal Felicja, Łódź. Pollando.  
 732 Penzner Zygmunt, Kraków. Pollando.  
 733 Wrzesiński Teodor, Kraków. Pollando.  
 734 Magnuszewska Marja, Kraków. Pollando.  
 735 Krenicka Zofja, Warszawa, Nowy Świat 37. Pollando.  
 736 Krenicka Wera, Warszawa, Nowy Świat 37. Pollando.  
 737 Smura Alojzy, Toruń, Ralińska 5. Pollando.  
 738 Goldman Ludmiła, Warszawa, Warszawska 17. Pollando.  
 739 Goldberger Leopold, Kraków, Grodzka 14. Pollando.  
 740 Lichenstadt Cecylia, Kraków. Pollando.

- 741 Traumówna Irena, Tarnów, Towarowa 338. Pollando.  
 742 Maly Aug., Brno, Vojanova 13. Ĉ. S. R.  
 743 Świętoszewski Robert, Wyszogród, Cukrownia, Mała Wieś. Pollando.  
 744 Engel Adolf Franciszek, Warszawa, Foksal 4. Pollando.  
 745 Jarecki Julian, Warszawa, Złota 56a. Pollando.  
 746 Loria Leonia, Kraków, Lwowska 25. Pollando.  
 747 Kłoda Tadeusz, Katowice, Kamienna 9. Pollando.  
 748 Zauchin Ida, Milano, (125), Via Scuole Ferrario 7. Italio.  
 749 Hebdowski Stanisław, ĉefserĝento de ŝtata polico, Kraków, Rękawka 3. Pol.  
 750 Lauterbach Dr. Jakób, Tarnów. Pollando.  
 751 Blech Leon, Przemyśl, Jagiellońska 6. Pollando.  
 752 Zachariasiewicz de Abgaro, Franciszek Teodor, Lwów, Św. Zofji 44. Pollando.  
 753 Hägglund Verner, Kiruna, Svedujo.  
 754 Godlewska Jadwiga, Pabjanice, Poprzeczna 15. Pollando.  
 755 Mandel Nachman, Łuck, Krzyżowa 22. Pollando.  
 756 Kopal Karol, Pravice, Ĉ-Sl.  
 757 Zug Raymond, Katowice, Kościuszki. Pollando.  
 758 Siwiec Antoni, Katowice, pl. Dra. Rostka 2. Pollando.  
 759 Faruga Franz, Katowice, Krakowska 7. Pollando.  
 760 Erichsen Marie, Oslo, Neuberger gt. 5. Norvegujo.  
 761 Wiancki Tadeusz, Kraków, Lubomirskich 35. Pollando.  
 762 Ender Janina, Pabjanice, Traugutta 2. Pollando.  
 763 Popova Kalinka, Sliven, Kiril i Metodi 39. Bulgarujo.  
 764 Kadiev Dro. Stefan, Sliven, Velikokujajevska 304. Bulgarujo.  
 765 Ismailov Hasan, Kirĝali, Bulgarujo.  
 766 Penkov Kiril, Ferdinando, Bulgarujo.  
 767 Tichawska Elżbieta, Katowice, Plebiscytowa 25. Pollando.  
 768 Nowakowski Piotr, Warszawa, Al. Jerozolimska 101. Pollando.  
 769 Dobrev Dimitar, Ruŝĉuk, Bulgarujo.  
 770 Kovaĉeva Rajna, Ruŝĉuk, Bulgarujo.  
 771 Toromanov Milan, Sviston, Bulgarujo.  
 772 Jakubowski Dro Paweł, Snów. Pollando.  
 773 Tazbirowa Lila, Warszawa, Wilcza 16/30. Pollando.  
 774 Orzech Józef, Kartuzy. Pollando.  
 775 Rudnicka Wisława, Kraków, Starowiŝna 12. Pollando.  
 776 Rudnicka Czesława, Kraków, Starowiŝna 12. Pollando.  
 777 Rudnicki Stanisław, Kraków, Starowiŝna 12. Pollando.

Laŭlanda statistiko de l' aliĝintoj. Aŭstrio 22, Belgujo 3, Britujo 85, Bulgarujo 10, Ĉeĥoslovakio 63, Danujo 7, Danciĝo 17, Estonio 8, Finnlando 4, Francujo 18, Germanujo 50, Hispanujo 1, Hungarujo 15, Italujo 18, Japanujo 8, Jugoslavio 3, Latvio 14, Nederlando 28, Norvegujo 6, Rumanujo 3, Saarteritorio 1, Svedujo 53, Svisujo 4, Alĝerio 2, Usono 6, Polujo 328.

#### ATENTU PARTOPRENINTOJ DE LA XXIII-a KONGRESO EN KRAKÓW!

Por fondi memoralbumon de la XXIII-a en Kraków, ni insiste petas ĉiujn partoprenintojn pri sendo de siaj fotografaĵoj kaj ankaŭ ĉiuj fotografaĵoj faritaj dum la Kongreso, ekskursoj, kunsidoj, kurso Ĉe k. t. p. La plej belaj kaj originalaj ricevos premion.

LA SENDAJOJN DIREKTU LAŬ ADRESO: LUDWIK KUTSCHER, KRAKÓW, GRODZKA 9. POLLANDO.

### INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA.

Dum la kunsido 4/VIII en la Kopernika prelegejo de la Jagellona Universitato ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj. Prezidanto prof. O. Bujvid tralegis salutleteron de la meritplena Ĝen. Sekretario S-ro Rollet de Lisle. Diversaj anoj de la Asocio esprimis la deziron, ke oni komencu eldonadon de la Scienca Revuo, kiu povus plivigliĝi la sciencan movadon esperantistan. La Prezidanto promesas proveldonadon de la dirita revuo laŭ la rimedoj, kiuj ĝis nun malpermesis fari tion. Estas jam kelkaj artikoloj, nun estas nur bezona la mono por la komenco.

La ĉeestantaro vizitis Sciencan Polan Akademion, en kies muzeo oni povis vidi faman rinoceron antaŭ kelkaj monatoj elfositan (Coelodonta antiquitatis) en petrolminejo en Starunia. Tiu unikajo en la mondo estas bonege konservita.

En la aperonta revuo estos la trovajo detale priskribita.



## RAPORTO PRI LA FAKKUNVENO DE ABSTINENCULOJ.

Ceestis ĝesamcelanoj el Anglujo, Aŭstrio, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danzig, Germanujo, Germanujo, Pollando kaj Svedujo, sub prezido de S-ano Watson, Anglujo, laŭ programo: Raportoj, Plua Laboro.

Raportis s-ano W. Mudrak, Vieno (Aŭstrio) prov. sekretario de dum la kongreso en Budapeŝto fondita „Internacia Esperantista Laborkomitato por senalkohola kulturo“ kies celo estas progagando de Esp. en la rondoj de nacie kaj internacie organizataj alkoholkontraŭuloj diverslandaj, atentigo je graveco de l' alkoholdemando inter la esperantistaro, internacia informservo, aperigo de artikoloj en esperantista kaj nacilingva fakgazetaro ktp.

Pro limigitaj fortoj kaj ĉefe manko de monrimedoj oni en la pasintaj 2 jaroj ne povis tiom efiki ol estus eble estinta dezirinde. Tamen oni atingis jenon! Aperis en multaj Esp. gazetoj raportoj pri la fondita komitato, aperis en abstinenculaj fakgazetoj de Anglujo, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danmarko, Jugoslavio, Bulgarujo, Nederlando, Svedujo k. a. artikoloj pri kaj por Esperanto kiel taŭga ilo por internacia kunlaboro de ĉiuj alkoholkontraŭuloj, en kelkaj landoj ankaŭ okazis kursoj de Esp. inter la abstinencularo i. a. en Zagreb (pere de nia kunlaboranto A. Skataric, cand. med.) Vieno ĉe Katol. Krucligo, la anglalingva internacia Bontemplano (Londono) per klopodo de s-ano Watson aperigas nun konstantan Esp. rubrikon; okazis pritraktado pri Esperanto en naciaj kongresoj de abstinenculoj en Danujo, Bulgarujo, Jugoslavio. La Laborkomitato ĝis nun havas Delegitejn, kunlaborantojn en proks. 10 landoj i. a. ankaŭ en Japanlando kaj Nederl. Hindujo. En Jugosl. S-ano Skataric fondis Abstinenculan Ligon Esperantistan Jugoslavan.

Pri plua laboro oni decidis jenon: Ŝanĝon de la titolo en „Internacia Esperantista Laborkomunumo por senalkohola kulturo“.

Plue koncerne centrejo: Vieno kaj tiea sekr. W. Mudrak restu provizore ankoraŭ. Sed ĉar sekr. W. M. estas multflanke ankaŭ alie okupata kaj en Danzigo ekzistas tre vigla rondo de esperantistaj abstinenculoj oni eble post ankoraŭ okazonta pli detala skriba intertrakto konsideros translokigon de la centrejo al Danzig. Ĉiuj eblaj ŝanĝoj estos sciigataj al ĉiuj kunlaborantoj. Oni ankaŭ reelektis s-inon Bramkamp-Weber, Scheveningen (ŝi bedaŭrinde ne povis ĉeesti) prezidantino.

En la interesa diskuto partoprenis dro. Kadiev, S-ano Pamporov, Bulgarujo, s-ano Ahnfedt, Svedujo, F-ino Spiess, Danzig, pastro Adam Furmanik, mariavito (Pollando).

Oni ankaŭ esprimiĝis por kvankam memstara tamen laŭebla kunlaboro kun parencaj movadoj: kontraŭtabaka, vegetara, pacifista.

Monrimedoj: Oni klopodu, ke laŭeble la landaj ligoj al kiuj IELK ja servas per havigo de raportoj, faciligo de internacia interrilatado ktp. iel subtenu la aferon (ev. oni ankaŭ disponigu iom da mono enspezita per Esp. kursoj inter abstinenculoj por laboro por komunumo). Plua laboro ankaŭ efektiviĝu per aperigo de artikoloj (raportoj) ktp. pri la alkoholdemando en la Esp.-gazetaro tutmonda, speciala rekomendo de „La Vegetarano“ „Fratario“ (Bulgarujo), kaj „Renkonte al la Suno“ (Pollando) disponigas apartan lokon al la celadoj de IELK por senalkohola kulturo. Fine propono por laŭebla kaj laŭpova influo de la esperantista vivo en direkto al senalkohola kulturo estis akceptata.

W. Mudrak, (Vieno) sekr.

## KURSO DE PASTRO CSEH.

Kiel sciante en julio (20--31) k. j. okazis en Krakovo III-a Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto, gvidita de la same konata esperanta pedagogo, Pastro Andreo Cseh. Malgraŭ la financa krizo en la mondo kaj la ne malgranda kotizo aliĝis al la kurso 270 personoj el 17 diversaj landoj, kion oni povas kurage nomi brila sukceso, ĉar ĝis nun neniu internacia kurso, precipe pedagogia, havis tiel grandan nombron da aliĝintoj.

La ĉambrego de Kopernik en la Jagellona Universitato estis tiel plena, ke la Organiza Komitato vidis sin devigata peti Pastron Cseh pri gvidado de dua vespera kurso, kiun peton Pastro Cseh bonvole plenumis.

Nova kaj nekonata ĝis nun en Esperantujo estis aranĝo de Seminario, kiu celis eduki kaj perfektigi la Cseh-metodajn kursgvidantojn, havigante al ili valorajn instrukciojn. La partoprenantoj konatigadis al si reciproke diversajn spertojn, kiujn ili akiris dum praktiko, instruante la lingvon.

La Urbeŝtraro, kiu Pastron Cseh invitis al la gvidado de la kurso, montris ankaŭ al la partoprenantoj de la kurso sian afablan gastamecon, invitante ĉiujn per urbaj aŭtobusoj al la arbaro „Wolski“, kie la Prezidanto de la urbo kolonelo Władysław Belina-Prażmowski bonvensalutis en esperanta lingvo la kursanojn, kaj Pastro Cseh kaj Prof. Bujwid, rektoro de la kurso, en mallongaj vortoj dankis por la invito. Poste okazis en la sama arbaro posttagmanĝo por la kursanoj.

Dum la kurso aranĝis la Organiza Komitato ekskursojn en la ĉirkaŭaĵon kaj vizitadon de la urbo.

Mallonge dirante (pro manko de la loko), la aranĝoj de pastro Cseh kaj la Haga Instituto apartenas al plej bone sukcesintaj tiel laŭ financa kiel ankaŭ laŭ propaganda vidpunktoj kaj ili multe helpis nin esperantigi la urbon, preparante ĝin tiamaniere al akcepto de la kongreso. La kursaj tagoj jam delonge pasis for, sed ĉe la loĝantaro restis la memoro de la genia instruisto, pastro Andreo Cseh....

Li kaj lia laboro treege faciligis al ni pluan poresperantan laboron!

Koregan dankon!

**Krakovano.**

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto (Den Haag, Nederlando, Oostduinlaan 32) sendis al ni jenan sciigon:

„La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto starigis Landan Sekretariejon por Polujo sub la gvidado de s-ro prof. Tadeusz Hodakowski (Lubicz 34, Kraków), al kiu de nun oni bonvolu sin turni en Polujo tiuj, kiuj deziras aranĝi Ĉe-metodajn kursojn kaj ricevi la kursmaterialon“.

**La Redakcio.**

La Organiza Komitato de la III Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto kaj de la Seminario, gviditaj de Pastro Cseh sciigas la partoprenintojn, ke la

### MEMORLIBRO

de la kurso jam aperis kaj estas dissendata al ĉiuj mendintoj.

Pluajn ekzemplerojn oni povas mendi rekte ĉe la sekretario D-ro Emil Jancałek, str. Dwernickiego 3, Kraków (Pollando) pagante Zł. 2.60 (enlande) aŭ 1.70 sv. fr. (por eksterlando).



## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Marsz. Piłsudskiego 33, Białystok. Konto ĉe P. K. O. No 60.047.

### OFICIALA BULTENO No 24.

NOVA ADRESO. Ni petas bonvoli noti, ke la nuna adreso de la Ĉefdelegito estas, pro alinomigo de la strato, la jena: ul. Marszałka Piłsudskiego 33, Białystok.

Pro kongresa vojaĝo de la Ĉefdelegito kaj amasiĝinta urĝa laboro okazis prokrasto en respondado de leteroj. La atendintoj bonvolu afable tion pardoni. Ĉiuj aferoj rulos nun denove laŭorde.

NEREPANGINTOJ. Responde je nia cirkulero, dissendita al la nerepagintoj, aro da ĝesamideanoj repagis sian kotizon kaj ricevis de ni bonorde siajn dokumentojn, la Jarlibron kaj gazeton.

Restas tamen ankoraŭ konsiderinda nombro da nerepagintoj. Ni ekspedas al ili duan cirkuleron kaj insiste petas, ke ili bonvolu repagi sian kotizon. Pro la ĝinanta baldaŭ ascia jaro ni ŝatus fermi la liston de anoj kun konforme grava nombro ĝenerala da membroj.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Septembro n. j. UEA kalkulis en Polujo 432 membrojn (4 DM, 16 MS, 228 MA, 168 M, 16 HM) kaj 1 Esp. Entreprenon Pasintjare je la sama dato pagis sian kotizon 379 membroj. La kresko do estas 53 membroj, kio estas tre ĝojiga. Tamen la ĝenerala nombro estas ĉiam ankoraŭ nesufiĉa kaj ne respegulas dece la forton de la Esperanta movado en Polujo. Tial ni devas fervore varbi por UEA por pligrandigi ĝian membraron en la lando, kie ĵus okazis Internacia Kongreso Esperantista kaj kie la Esperanta movado senteble plivigliĝas.

NOVA DELEGITO. Plezure ni notas novan Delegiton:

BRODY. D. Oskar Spielmann, poŝtkontrolisto.

Białystok, la 1. IX. 1931.

J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.



## HUMORO DUM LA KRAKOVA KONGRESO.

**N**i legis jam kelkajn raportojn pri la XXIII kongreso en Kraków, raportojn kritikajn kaj gravajn.

Permesu nun al mi rakonti al vi kelkajn iomete humorajn, eĉ tute verajn historietojn.

Por komenci mi rakontos al vi pri la seniluziiĝo de du ĝesamideanoj dum la kongreso:

Unu pola esperantisto post fino de sia kurso volante plibonigi sian novan sciencan, decidis korespondi kun iu eksterlanda samideano. Li serĉis inter la adresoj en esperanta gazeto, meditis kaj fine elektis: samideanino. La nomo plaĉis al li... Lia riĉa fantazio pentris la belan aspekton de la fraŭlino.

La korespondado komenciĝis, la leteroj fariĝis pli kaj pli interesaj, ĝajaj, intimaj kaj varmaj. Nia samideano invitis sian novan amikino Krakovon al la kongreso. Granda estis lia ĝojo kiam ŝi respondis, ke ŝi certe venos. La leteroj flugis ofte, rapide kreskis la afero de reciproka simpatio.

La tago kaj la horo de la rendevuo estis fiksita. Tiun matenon nia verda kavaliro kun rozbutono en sia vestaĵo kaj fulmbatanta koro ekatendis alilandan amikino en la kongresejo.

Li reveme priĝigadis kelkajn fraŭlinojn. Subite!... Blanka rozo en la maneto, nel preskaŭ manego! Fiksrigardo, mallumo en la kapo, sango en lia koro. La rozo jetita sur la plankon elkis.

Li eliris, verdire... elkuris el la kongresejo. Sur plantbenko revenis lia spiritegeco. Eltirante sian poŝtukon li forviŝis ne larmojn sed... sian ŝvititan frunton.

Oni povas senpene imagi la eksterlandan belulinon. Sia entuziazmo sulĉas. Ĉu la energia samideanino, konanta lian nomon kaj adreson trovis lin — la historio preferas diskrete silenti.

Neĉiutaga estis la rakonto pri aliaj gekongresanoj.

Ekkoniĝo sur la ŝipo, dum la ekskurso... Ili treege plaĉis sin reciproke kaj de tiu tago estis ĉiam kune. Okuloj brilantaj, buŝoj tentantaj, koroj dezirantaj. Kion fari? Malgranda di' Amoro ankaŭ alvenis por la kongreso, volante kapti novajn viktimojn. Sed feliĉo estas pereema. Lastatage tiu fraŭlino vane serĉis sian adoranton. Post maltrankvila atendo ŝi rimarkis amikon de sia kunulo.

— Ĉu vi ne scias, kie estas via amiko? — Ilustris ŝi time.

— Mia kolego! Ho! kara fraŭlino! Li estas jam malproksime! —

Ŝi detklakis nerveze. — Tio estas malebla! Li forveturis sen mi? ŝia fianĉino? —

— Trankviliĝu fraŭlino! Via fianĉo estas bonega edzo kaj patro. Kvar belaj infanoj atendas lin hejme.

A propropos ĝeedzoj ankoraŭ unu historieto!

Juna, ĝentila paro ravis nian societon sur la ŝipo. Fremda sinjoro prezentis sin elegante kun sia edzino. Agrable estis observi lian afablecon. Kortuŝis tiom da sentimento kaj vera amo, kiun montris la juna sinjoro al sia edzino.

Estas malmultaj, feliĉaj ĝeedzoj en la mondo kaj pro tio ni ĝojis treege. Li ĉirkaŭbrakis ŝin, por ke ŝi ne falu en la akvon. Ili havis feliĉajn mienojn kaj ĉiuj de la societo parolis nur pri la ĝeetzamo!

Sed bedaŭrinde en la arbareto la juna homo malaperis. Lia amanta edzino — ĉiu edzino farus same — serĉis lin energie. Post kvarono da horo la serĉado montriĝis vana. Unu afabla akompananto, kun ne bela sed forta voĉo, proponis ĝentile:

— Diru lian nomon! Mi ekkrios forte kaj li aŭskultos nin. — La sinjorino fariĝis ruĝega!

— Lian nomon?... lian nomon mi... mi forĝesis tute ĝin! —

Estis dum la kongreso unu samideano, kiu kun neniu povis interkompreniĝi. Mi havis grandegan respekton al li.

— Sendube li estas Aŭstraliano aŭ Afrikano — kaj pro tio mi lacigis min terure parolante kun li. Fine mi modeste demandis.

— De kiu lando Vi estas, sinjoro. — De Sosnowiec. Polujo. — Diablo! — mi ekkriis pole — kial vi ne diris tion tuj?! Ĉar mi pensis, fraŭlino, ke Vi estas Italino.

Multaj fraŭlinoj ŝatas laŭdi sin pri la eksterlandaj sukcesoj.

— Mi ekkonis ĉarman varmsangan Hispanon! Li enamiĝis je mi terure. Rigardu! Li staras malproksime de nia pordo!

— Karulino! vi eraras! Tio estas Estono! Li diris al mi tion en la Pavilono. Ni dancis dum la tuta nokto! —

Ili laŭtege interdisputis. Fine ili decidis iri al la junulo por solvi tiun problemon. Samtempe ili aŭskultis kun treega mirigo, lian voĉon, en klara, bonega pola lingvo:

— Bonan tagon! Kiam vi alvenis de Varsovio?

Niaj anglaj amikoj miregis en Pollando senĉese. Jam la unuan matenon ili komencis ridi. La loĝmastrino donis al ili matenmanĝon.

Ili pririgardis kaj demandis ridante.

— La teo estas bona post tagmanĝo. Sed kie ĝi estas?

Hawelka estis la paradizo por iliaj stomakoj. Volante manĝi ĉiujn malkonatajn aĵojn, ili terure miksis. Efekto estis neantaŭvidebla por unu el ili. Malfeliĉa, scivola knabo fariĝis stomakmalsana! Li perdis tutan esperantan tagon, en sia lito,

Amiko de tiu frandemulo havis alian aventuron. Li tute forgesis, kie li loĝis. Malgraŭ ke Kraków estas tiel malgranda, li migris tra la urbo dum kelkaj horoj. Li jam estis preta dormi en la plantejoj. Nur feliĉa hazardo savis lin. Poste li rakontis pri tio:

— Mi ne povis rememori tian kelkkilometran nomon de l' placo.

— Tio estis placo Szczepański!

Oni multe rakontas ĉe ni pri la seka, malvarma temperamento de Angloj. Unu de ili staris sur la ŝtuparo. Pola fraŭlino, volante esti afabla mast-rino, demandis ĝentile:

— Ĉu vi deziras ion?

— Jes — li respondis mallonge — vian kison! —

En Pavilono freneze dancis kelkaj Angloj. Unu de ili akompanis ĉiam unu fraŭlinon. Kelkaj horoj pasis gaje. La fraŭlino (majstrino en flirtado) mokis iomete la varmeĝan amon de sia kundancanto.

Li ekkriis furioze:

— Alvenigu pastoron! Mi amas vin. Mi volas tuj edziĝi je vi!

Por trankviligi lin, oni asertis ke angla pastoro ne ekzistas en Krakovo.

Oni ne povas scii, ĉu tio estis varma sango, aŭ pola brando.

Homoj estas ĉie kaj ĉiam malicaj.

Malgraŭ ĉio ili ne konservis malbonajn memorarojn de nia urbo. Ili ĝentile skribis leteron de Londono, ke ili longe memoros pri la ĝajaj krakovaj tagoj, belaj fraŭlinoj, sed plej pri niaj bonegaj... kukoj!

Mi finas mian bultenon kun la espero, ke la ekzemplo de miaj (tute aŭtentaj) anekdotoj elvokos aliajn memorarojn. Ĉar mi scias bonege, ke tio estas nur parteto, de granda, sana, kongresa humoro.

Irena Szczepańska.

ADOLF DYGASIŃSKI.

## AŬTUNE.

**F**iniĝis aŭgusto! La naturo aspektas kiel homo, kiu en la vivo havis multe por fari, elĉerpis sian bravecon, flaviĝis, ricevis sulkojn, kalviĝis, perdis la dentojn kaj komencas emiĝi al pli daŭra ripoz' en la tombo.

La suno ĉirkaŭrostis la teron, tutfritis ĝiajn florojn, senigis ĝin de koloroj. Rompiĝis nun la trunketoj, elŝeliĝas kaj ŝutiĝas la semoj de plantoj. Polvoj diktavole aĉiĝis apudvojnajn arbojn, arbustojn, herbojn; vi rimarkas tie nek koralan frukton de l' kampa rozo nek malhelbluan globeton de l' prunelo aŭ rubusan beron.

En l' aero volviĝas araneaĵo, algluiĝas sur arboj, eksidas sur stoploj, ĉirkaŭvolvas tersulkojn kaj oni frumatene vidas laĉitajn sur ĝiaj fadenoj brilantetojn de roso.



Ĉielblue fumas en kampoj la fajrujoj de paŝtistoj. Aroj da kornobrutaro elmordas restaĵojn de herboj, kaj inter la brutaro blankaj kaj nigraj ŝafoj, amasoj da parte senplumigitaj anseroj kaj malpuraj porkharaj kvarpieduloj.

Se ĉi tie estas ankoraŭ ie la koturno, ĝi alkaŭris silentege, ne perfidas sin per voĉo, movo. Kaj l' alaŭdo silentas, ekkantas nur senpripense, eligas voĉon kvazaŭ de miro kaj falkaŝiĝas.

Ĉirkaŭ tiuj grenkampoj, grizantaj per stoplaroj, nigrantaj per detranĉaĵoj de freŝa glebo, tiriĝas zonoj de l' arbaroj, kiuj defore sur la lazuro refleksiĝas per ruĝo, flavo, neklara verdo — kvazaŭ senkoloriĝinta mantelo.

Kaj super la kampoj senĉese traflugas tutaj generacioj da kantbirdoj. Tio estas la junularo, elkovita ĉisomere, kiu kune kun gepatraj paroj amase transflugas por manĝo tien kaj reen. La kardejoj flugfalas sur la senkoloriĝintaj kardoj, el kiuj ili elpinĉas lanughavajn semojn; la fringelojn logas alnoj, havantaj en malhelaj nuksetoj bongustajn kernetojn; aroj da sturnoj diboĉas sur humidaj marĉherbejoj, turdoj kun granda tumulto rabas juniperajn arbustojn.

En ĝardenoj defalis blankaj kaj puncaj petaloj de papavoj, kaj restis nur malpuraj makulhavaj kapetoj. Monstraj kapegoj de sunflokaj superas la sekiĝintajn trunketojn de terpomoj kaj iliaj malpuraj diskoj aspektas kiel timigiloj kontraŭ paseroj. Verdepaliĝis ĝisblanke larĝaj rubandoj de maizaj folioj, nigriĝis iliaj plikoj, ĉirkaŭantaj flavajn aŭ ruĝajn semojn. Jen bluas jen verdas malmolaj kaj dikaj kapoj de brasikoj. Per flavet-ruĝaj vangoj ŝajnas graciĝis al la suno tuberhavaj tomatoj kvazaŭ ŝveliĝintaj. Laŭlarĝe de l' terstrio sin eltiris dikega kukumo, flava ĉe la kapo, putretinta surventre, en piedoj variolcikatra, palverda melono, kvazaŭ ĉirkaŭdratita kontraŭ la kreviĝo kaj deŝirita de sia vosteto, ruliĝis en la sulkon. La ruĝa beto elrigardas de la tero; malvaste ĝi havas kaj ŝajnas envii la brasikrapon, kiu sur tersupraĵo dikiĝas. Ĉirkaŭe nazbatas ĉi tie l'odoro de celerioj, petroselo, kumino. Kie ajn vi tuŝos — provizejo kaj kuirejo.

Sur folioj de lektuko, brasiko kaj rafano malviglemaj, harkovritaj raŭpoj volviĝas, iraças atidoj kaj formikoj, farante l' impreson de estaĵoj, diligente okupitaj pri seriozaj verkoj. Limako eltiris kornojn kaj ŝajnas konduki senvortan malpacon kun bufo; ili rampis ambaŭ kontraŭ si, kaj nun unu al l' alia ne volas deiri de la vojo...

En fruktĝardenoj, ĉirkaŭ la latbariloj kaj palisaroj la sovaĝa vino ruĝas per folioj, kaj vetkonkuras kun ili folioj de ĉerizoj. Malhelbluaj prunoj fleksas la branĉon, kiun sufiĉas moveti, ke ili refalu hajle. Tromaturaj piroj orkoloras de la arbosuproj kaj logas arojn da vespoj al si. Globformaj, pufvangaj pomoj ŝajnas bonkore rideti reciproke al si, kvazaŭ vangetoj de sanaj, ĝajaj infanoj...

Tradukis Tadeusz Hodakowski.

MARJA MARKOWSKA.

## LEGENDO PRI ERIKOJ.

Rigardis de l' alta ĉielo Dipanĵeto la diligentan surteran laboron kaj benis ĝin per hela rideto. Kontente ŝi vidis pezajn veturilojn, malfacile portantajn garbojn kaj maturajn fruktojn en la fruktĝarde-

noj kaj ruĝbrunajn panojn, el nova greno bakitajn en la kabanaj, ŝi ĝojis pro multaj plugiloj, kiuj ĉiutage vigle marŝadis kampen.

Kaj havis tie en la ĉiela kantistaro ĉiu landparto sian anĝelon. En tiu aŭtuna sezono, fruktplena kaj malavara, ĉiu sankta protektanto ĝojan havis vizaĝon, ĉar jen rikoltoj bone prosperis al la homoj, kaj por plugado, por semado la vetero estis daŭre kvazaŭ elektita. Kaj oni havis ion por semjeti en la nigran teron kaj provizojn por la vintro. Tial en ĝojo promenis la anĝeloj, kiuj protekton pri l' tero prizorgis. Eĉ kiu per siaj flugiloj ĉirkaŭigis rokplenan kaj malriĉan subkarpatan teritorion, kie mizeraj avenetoj sur nefruktodonaj grenkampetoj balanciĝis, eĉ tiu per hela vizaĝo sciigadis, ke nenia mizero vizitis la mastrojn, sur deklivoj de fieraj montoj sidantajn.

Estis tamen inter anĝelaj muzikistoj, inter la sanktaj protektantoj unu, kies vizaĝon malĝojo kovris, kiel nubo krepuskiga sur helan ĉielon enirinte, la ĝojplenan sunon per malhela vualo malbriligas. Kaj jen tiu ĉi dia anĝelo svarman, homplenan kaj arbarabundan Mazurujon havis en sia protektado. Tiu ĉi ne unufoje paroladis pri profunda serioza susurado, de senlimaj arbaregoj, kiun li la plej mirakla muziko konsideris. Li paroladis pri maljunaj arboj, atestantoj jarcentaĝaj de la pasinta estado. Pri la rakontoj el prapraaj jaroj, kiujn generacioj de l' arboj kiel plej grandajn trezorojn en senerara memoro konservadis. Kaj pri tio, kiel la homoj vivis de la arbaregoj, per plenaj manplatoj ĝiajn nemezureblajn riĉaĵojn ĉerpante.

Kaj jen nun l' arbarega anĝelo kaŝadis sin post la aliaj kaj profunde klinadis belegan, pro malĝojo paliĝintan vizaĝon. Sed jam lumplenaj okuloj de Plejmizerikordulino rimarkis lian malĝojon. Tuj la bonkora demando eliĝis el sankta buŝo. Kaj tiu ĉi respondis malĝoje:

— Ke vi mem, Dipanjeto, rigardu tiun ĉi teron, kia ĝi estas nun! Ke nur viaj piedoj transpasu tiun teruran solejon!

Do tuj kapsignis la favora Sinjorino kaj kvazaŭ lumeca radio ventflugis al tiuj arbaroj kaj arbaregoj. Sed baldaŭ granda miro kaptis ŝin. Ja jen ŝi bone konis la arbaran teritorion! Kaj jen ŝi iras, iras kompletan solejon. Sablajoj nur kaj sablajoj sterilaj, en kiuj la sanktaj piedetoj dronas. Tedas la varmego, kaj de nenie l' ombro refreŝigas. Malaperis malvarmetaj, verdaj arbaregoj, zumantaj per mirindega muziko. Nur la radikaĉoj kuntorditaj, arbotrunkoj sekaj, malĝojaj kiel ostaroj, restis post iama vivo! Hej, mastrumis ĉi tie, mastrumis fremda homo, malbona veninto! Ne restiĝis maljunaj grandeguloj antaŭ l' akra hakilo, antaŭ la perejo kaj morto!

Tiam per okulo malĝoja rigardis Plejsanktulino tiun dezertejon malvivan kaj obtuzan kaj en granda ĉagreno ĝemetis:

— Ho, domaĝe pri miaj arbaroj, domaĝe!

Kaj kvankam jam tre laca estis la sankta Vagantino, tamen ŝi ne ĉesas kaj pluen iras, por tutan tiun pereon rigardi, kaj konvinkiĝi, kiom malproksimen ĝi vastiĝas. Fine ŝi venis grandan senarbejon, kie iam staris praaj kverkoj, grandegajn branĉojn ĉielen levante. Sed nun estis tie kompleta dezertejo, silenta. Kondukis tra ĝi la malĝajaj okulojn la Ĉiela Sinjorino, kaj subite en perfidaj radikaĉoj implikiĝis la sanktaj piedetoj. Falis la Vagantino sur tuberhavajn trunkojn kaj kontuziĝis kontraŭ ili dolorige. Kaj sin levinte ŝi devis eksidi kaj ripozi longe post tiu malbona akcidento. Ĉar post la kverka elhakejo



susuris peco de saviĝinta arbaro, tial sur ĝia rando, en refreŝiga ombro ripozadis Plejsanktulino.

Kaj jam el alta ĉielo terensendis Sinjoro Jezuo Siajn anĝelojn. Do ĉi tiuj etendadis tapiŝon de molaj muskoj kaj kovradis per ĝi la perfidajn radikojn kaj akrajn trunkojn, por ke Dipanjo ne vundu kontraŭ ili Siajn piedetojn. Kaj ŝi, ĉe l' arbaro sidante, kun dankema rideto tiun anĝelan laboron rigardis. Ŝi malligis kaj demetis de si la ŝatatan antaŭtukon, kiu tiel roze kaj lilie ŝanĝkoloriĝadis, kiel ĝuste la serena ĉiel' en matenaj horoj de tagiĝo. La Sinjorino demetis l' antaŭtukon kaj per blankaj fingretoj je ĉifonoj etetaj ĝin pinĉas kaj la ĉifonetojn sur la verdan muskotapiŝon jetas. Tuj sur flugilojn siajn kaptis ilin la venteto facila kaj ĉien, ĉien portas.

Ekpaŭzis en sia laboro la Disinjuraj anĝeloj kaj rigardas mire. Ĉar jen jam sur malhela verdo de muskoj ekruĝetiĝis kaj heliĝis pro tiuj malgrandaj fibretoj, pro maldikaj fadenetoj, per sanktaj manetoj el l' antaŭtuko elpinĉitaj. Stariĝis subite la tuta arbarinterspaco en malgranda lili-ruĝeta floraro. Sur sekaj branĉetoj ekpendiĝis etaj sonoriletoj kaj trateksis dense la muskan tapiŝon, deprenis malĝojon kaj ĉagrenon de la sola dezertejo. Jen ekfloris erikoj el l' antaŭtuko de Sankta Virgulino. La trunketojn ili havas maldikajn, sveltajn kvazaŭ pinetoj, kaj sur ili folietojn verdajn, delikatajn kaj tiujn sonoriletojn, kiuj roze kaj lilie koloralternas, ĝuste kiel serena ĉiel' en matena krespusko.

Bedaŭris la favorema Sinjorino sablecajn, malĝojajn solejojn post forhakitaj arbaroj. Ŝi bedaŭris la homojn, kiuj nur senvivigis ĉagrenan grizecon estis rigardontaj, nenian trovante konsolon por sopirantaj okuloj. Elkreskis erikoj persistaj kaj graciaj sur Mazurujaj mizeraj sablaroj kaj diskreskiĝis de tie sur la tuta tero.

Tradukis Tadeusz Hodakowski.

## GRAVA ANONCO.

Ĉiu esperantisto scias, ke la fideleco al „Fundamento” respeguliĝas ne nur en la observo de la „16 Reguloj” de la Gramatiko, sed ankaŭ per observo de la „FUNDAMENTA VORTARO” kaj uzo de kiel eble nur oficiale per la Esp. Akademio akceptita vort-trezoro. Pro tio ĉiu esperantisto-ĉu komencanto ĉu progresinto, devas nepre posedi la nun solan sur la pola komerca merkato

„Plenan Fundamento-Vortaron De Lingvo Internacia Esperanto”

„Pełny Podstawowy Słownik Języka Międzynarodowego Esperanto” prilaboritan de la redaktinto de l' „Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj”. Ĝi entenas ankaŭ la plej novan 4-an „Aldonon al Fundamento” de la Akademio de l' jaro 1929.

Por ebligi al ĉiuj akiron de ĝi eĉ en nuna ekonomie kriza tempo, la eldonintoj **reduktis la prezon de la Vortaro**

**de la nunaj 4.— zł. je 3.— zł. (plus 10% por sendkostoj)**

Mendu do tuj — ĉar baldaŭ la stoko estos elĉerpita! — ĉe la aŭtoro

Jan Zawada, ul. Zaciszna 2.

Miasto-Ogród Czerniaków, WARSZAWA.

## ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ.

Oficiala Komuniko Nr. 6.

Pro financaj malfacilaĵoj nur al duono de abonintoj la Adreslibro povis esti dissendita antaŭ kaj dum la XXIII Internacia Esperanto-Kongreso (nur parteto repagis la sendkostojn). Al la dua duono ĝi estas entute ekspedita inter la 7-a kaj 15-a de septembro k. j. kaj nun absolute ĉiuj abonintoj devas jam havi ĝin. Se-

iu el ili (signitaj en la libro per steleto) ne estus ricevinta ĝin, li bonvolu tuj reklamaci ĉe l' poŝto aŭ ĉe la Redakcio.

La samaj financaj malfacilaĵoj devigis la Redakcion al dissendo de Alvoko, en kiu ĉiuj abonintoj estas petataj nepre repagi la poŝtelspezojn kaj al la jam pagitaj 2 zł. alpagi ankoraŭ 1.— zł., ĉar 2 zł. ne kovras eĉ plej modeste kalkulitajn proprajn kostojn de la eldonajo.

La Kasa stato de la Adreslibro ĝis momento de la apero de l' libro prezentigas jene:

ELSPEZOJ. Organizaj kaj redakciaj kostoj de la preparado de „Centra Pollanda Esperanto-Sliparo“ kaj de la „Adreslibro“ laŭ la suba detaligo	Zł. 1980.—
Kalkulo de l' presejo por 4000 ekz. (kompostado, presado kaj broŝurigo)	„ 5415.—
Kalkulo de la Paper-vendejo por la papero	„ 1050.—
	kune <u>Zł. 8445.—</u>

ENSPEZOJ. Kiel abon-engagojn ni ricevis entute	Zł. 1853.—
Kiel prunto de „Pola Esperanta Delegitaro“ pere de S-ro Prof. Dr. Odo Bujwid	„ 1000.—
Por la anoncoj en kaj ekster la teksto ni devas ricevi	„ 585.—
	kune <u>Zł. 3438.—</u>

Deficito, kovrota per la disvendo de la libro	„ 5007.—
	<u>Zł. 8445.—</u>

La disvendo progresas tre malrapide kaj la eldoninto estas pro tio devigata pagi la ŝuldojn de propra modesta oficista salajro. Pro tio ni turnas nin al ĉiuj aktivaj esperantistoj, kurs-gvidantoj, estraroj de ĉiuj Esp.-societoj en Pollando kaj eksterlande — bonvole helpi al la disvendado per forta agitado por la aĉeto de l' libro.

**DETALIGO LE LA ORGANIZAJ KOSTOJ:** 6000 kartoj por la „Centra Sliparo“ zł. 62.—, 7000 prospektoj kaj alvoko pri la Adreslibro 200.— zł., poŝtmarkoj por la prospektoj 300.— zł., kovertoj 66.— zł., Poŝt-ĉek-engagiĵoj 57.— zł., korespondajo kaj aliaj oficejaj elspezoj 163.— zł., Anoncoj 53.— zł., Tramvojoj 61.— zł., Oficeja helpo 350.— zł., manĝajo 71.— zł., maŝin-skribado 28 zł., dua nepagita libertempo de l' redaktinto por fini la libron antaŭ la Kongreso 500.— zł., entute, ne kalkulante la unujan laboron de l' aŭtoro 1980.— zł. kiel supre.

La libro enhavas 4060 adresojn. Pluaj novaj estos, komence de la sekvonta Nr. presitaj sinsekve en ĉiu Nr. de „Pola Esperantisto“ kune kun la anoncitaj al ni ŝanĝoj, korektoj ktp. Ĉiu Esp.-organizajoj, grupoj, rondoj kaj izoluloj estas do petataj alsendadi sisteme al la Redakcio la koncernan materialon, kiu servos kiel bazo por la dua eldono de la libro. Rilate al novaj adresoj ni petas liveri al ni adresojn de nur vere konantaj la lingvon Esperanto. Komencantaj kursanojn oni tenu en evidento ĝis ili finlernos. La indiko de profesio ĉe ĉiu adreso estas tre dezirata, ĉar tio plivalorigas la Adreslibron.

Depost la 1-a Oktobro 1931 oni sendu ĉiun materialon, koncernantan la redaktan parton de la Adresaro — al la Redakcio de „Pola Esperantisto“ — Kraków, Lubicz 34. kun la noto „por la Adreslibro“.

La Redaktanto: Jan Zawada.

### RECENZO.

**Albin Neuzil: Metodo de la manpresitaj ornamajoj. I. parto.**

Kuŝas antaŭ ni precize prilaborita verketo, kiu devas ekinteresi speciale instruistojn. Ĝi enhavas 8 tabelojn kun multaj ekzempleroj de belaj manpresitaj ornamajoj. Ampleksa antaŭparolo precize klarigas la labormetodon. Verketo rekomendinda.

### DE LA REDAKCIO.

Pro granda abundo de la kongresa materialo ni estas devigataj prokrasti niajn kutimajn fakojn, kiel kroniko, recenzo de multaj libroj — ĝis la venonta numero.

La nuna numero aperas iom malfrue pro malhelpoj en kompletigo de la materialo. — La sekvontan ni eldonos komence de l' oktobro.

Ministerio por Eksterlandaj Aferoj decidis aĉeti provizore 100 ekz. da pola numero de „Literatura Mondo“ por propagandaj celoj.

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss, Kraków.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, ul. Stolarska 6.



## SOMERA SURPRIZO

fariĝis por la esperantistaro la verkoj de la fama hungara verkisto

### KOLOMANO KALOCSAY

tradukinto de Tragedio de l'Homo — ĉefredaktoro de Literatura Mondo

Fine de julio aperis la tri verkoj:

**Streĉita Kordo**, originalaj poemoj de la verkisto. Vi trovos en ĝi la plej famajn poemojn: „La patrieco“, „Pala procesio“ k. a. 196 paĝa. bindita zł. 11.35, broŝ. zł. 7.80.

**Rimportreto**, 55 portretoj de Esperanto-steloj el ĉiuj tendencoj de la movado, kun foto de la „steloj“, 128 paĝa; bind. zł. 8.80, broŝ. zł. 6.—.

**Lingvo, Stilo, Formo**. Studoj pri Esperanto. La plej abundaj klarigoj pri la Esperanta versifado, rimaro, internacia stilo; pri la evoluo de Esperanto, verkita de la plej fama nuntempa stilisto. 144 paĝa; bind. zł. 9.50, broŝ. zł. 6.—.

Por sendkostoj aldonu 10%.

Rapidu mendi ĉe

Administracío de „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34.

Konto P. K. O. 406.660.

Eldonis: Literatura Mondo, Budapest.

## DUM RIPOZAJ HOROJ

Ĝue vi legos la novan romanon de la originala verkisto

Jean Forge:

### MR. TOT AĈETAS MIL OKULOJN

Facila lingvo, interesa temo, bonega stilo karakterizas la verkiston en ĉiuj siaj verkoj kaj la nova verko eĉ por komencantoj estas plej facile legebla!

Konvinkiĝu pri tio kaj mendu tuj ĉe:  
Admin. de „Pola Esperantisto“ Kraków, Kubicz 34.

Konto P. K. O. 406.660.

Prezo: bind. zł. 11.35; broŝ. 7.80; per sendkostoj aldonu 10%.

Eldonis: Literatura Mondo, Budapest.

## TUTMONDA KOLEKTANTO

La sola gazeto por kolektantoj.  
Redaktas Dro Jozefo Takács.  
Administracio en Jablonné n. Orł., Ĉ. S. R. Aperas dumonate.  
Abono 0.40 dolaro aŭ egalvaloro. Specimennumero kontraŭ respondkupono.



## ESPERANTYŚCI!

Nabywajcie niezbędny materiał propagandowy w języku polskim!

Czechowski — Podróż po świecie dostępna dla każdego . . . . .	0.50
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm; Wyd. I. . . . .	1.25
„ — Esperantyzm; Wyd. II. . . . .	3.00
Drojecki — Esp-o i jego zastosowanie w praktyce . . . . .	0.30
Greffkowicz — Niemi przemówią . . . . .	1.50
„ — Spóźnione hasła, ze słown. esp.-pol. . . . .	0.50
Gryff — W sprawie nauki języków obcych . . . . .	0.50
Kartki pocztowe (motto Żeromskiego) 10 szt. . . . .	0.50
„ : grób Zamenhoła . . . . .	0.25
Kronenberg — Dwa artykuły w sprawie Esperanta . . . . .	0.30
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego . . . . .	0.15

pozatem obfitą literaturę naukową, belestrystyczną wysyła za uprzednią wpłatą gotówkową na konto P. K. O. 406.660 z dodatkiem 10% na kosztą przesyłki (przesyłka polecona 50 gr. więcej).

Administracja „Polskiego Esperantysty“ Kraków, ul. Lubicz 34.

Katalog na żądanie bezpłatnie.

Jest to pierwszy kompletny podręcznik, który różni się od dotychczasowych podręczników polskich swoją nawskróś nowoczesną metodą. Każdy, który prowadzi kurs, powinien natychmiast zapoznać się z naszą metodą, która daje możność nauczania Esperanta w bardzo przyspieszonym tempie. Metoda — zanim wyszła drukiem — została praktycznie wypróbowana w szeregu kursach, w miarę potrzeby udoskonalona i doprowadzona do obecnej formy.

Cena kompletu 10 lekcji wraz z słówkami w karton. tece (format 21x33) wraz z przesyłką pocztową — zł. 1.75.

Do nabycia w Admin. „Polskiego Esperantysty“, Kraków, Lubicz 34. — Konto P. K. O. 406.660.

## Polskie Akademickie T-wo Esperantystów — Warszawa prowadzi

### Kurs korespondencyjny języka Esperanto.

Kurs polega na tym, że uczestnik jego otrzymuje podręcznik języka Esperanto, podzielony na 12 lekcji, przerabia co tydzień jedną lekcję, tłumaczy ćwiczenia z Esperanta na polski i odwrotnie, po czym przesyła je do poprawienia.

Aby zostać uczestnikiem kursu, należy wpłacić zł. 15.— (ewentualnie w dwóch ratach: 10 zł. przy zapisie, zaś resztę po czwartej lekcji). Opłata ta obejmuje całość kursu wraz z samouczkiem, poprawą przerobionych ćwiczeń i przesyłkami pocztowymi.

Opłatę oraz ćwiczenia (przysyłane w zeszytach) należy kierować pod adres:

Polskie Akademickie T-wo Esperantystów, Warszawa,  
Leszno 99, m. 5.

### POLSCY ESPERANTYŚCI

Macie sposobność zaznajomić się z dwiema nowościami wydawniczymi w dziedzinie nauczania Esperanta:

- 1) Czytanki Esperanckie Anekdotaro. Cena 1.50 zł.
- 2) Słownik esp.-pol. i pol.-esp. Cena 1.— zł.

Żądajcie okazania Wam egzemplarzy.

Przy większym zamówieniu wysyłkę uskutecznią pod zleconym adresem wydawca:  
Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

### „KSIĘGA ADRESOWA ESPERANTYSTÓW POLSKI“

wyszła z druku i zawiera następujące rozdziały:

Przedmowa do esperantystów zagranicznych i polskich, „Pracyczny Informator Esperancki“: kompletny poradnik dla samouków, spis gazet esp. całego świata, budowa organizacyjna międzynarodowego ruchu esp., informacje językowe, zdobycze Esperanta w okresie powojennym, spis esperanckich kont w P. K. O. — a w części drugiej — adresowej: wykaz wszystkich stowarzyszeń i kół esp. w Polsce oraz adresy 4050 esperantystów polskich, wraz ze szczegółowym skrowidzem według zawodów i zainteresowań. Format książki 20x13, stron 220, — cena tylko zł. 4.—.

Nabyć można w Administracji „Polskiego Esperantysty“, Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO 406.660, lub wprost w Redakcji „Księgi“ na adres: Jan Zawada, ul. Zaciszna 2. Miasto-Ogród Czerniaków, Warszawa. Konto PKO 20845.

### NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1931!

Paĝu la abonon je nia konto PKO 406.660.

Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!  
Abonu la polan propagandan revuon „Pomocniczy Język Światowy“.

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.